Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines
Esperanto Association

VOL. II., No. 2 & 3 SEPT.-OCT., 1908

DOUBLE
NUMBER

THE DRESDEN CONGRESS



CAVITE P. I.

Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines Esperanto Association

Published by the Executive Committee of the Philippines Esperanto Association at McCullough Building, Manila.

Entered at Post Office at Manila as Second Class.

Vol. II, No. 2-3 SEPT.-OCT., 1908 20 centavos

Filipina Esperantisto

ĈIUMONATA PROPAGANDILO

ADRESO:

W. H. Case, P. O. Box 326, Manila, Filipina Insularo.

Annual Subscription ..... ₱ 2.00
Unu peso (₱1.00) egalvaloras 1026 spesojn

JARA ABONO—EKSTERLANDE: Oni akceptas deksep internaciajn respond-kuponojn.

NOTES AND COMMENT

The Fourth Annual Congress of Esperantists has come and gone. It has proved itself from all accounts a greater success than was even anticipated; both in regards to numbers and enthusiasm it has outstripped the previous congresses.

We are devoting this issue almost exclusively to it.

o

Mr. Charles S. Banks, of the Bureau of Science, who attended the Dresden Congress as delegate for the Philippines, has sent a few lines to us. The detailed report of which he speaks will not reach us in time however for this issue.

Dresden, 23-VIII-08.

Esperanto Congress great success. More than 1500 official delegates. "Iphigenia" superbly acted—Nia Majstro persone sendas "Koran saluton al la tuta Esperantistaro en Filipina Insularo kaj esperas multajn bonajn rezultatojn de nia Asocio tie" his own words. I have his portrait which he signed for me. Great applause greeted my salutation from Philippines. Speech will follow and also detailed report. I was greeted as the delegate "el plej malproksima lando"—Zamenhof very enthusiastic when I told him that I was from the P. I. and that we have 600 members there. He shook my hand heartily and said *koran saluton! koran saluton! kaj donu al la tuta Filipinaj Esperantistaro mian plej sinceran saluton kaj bonesperon pri la aferoj de nia celo.*—BANKS

o

Quite a revival of interest is being shown locally in the movement.

o

There is no member of our Association more energetic than Mr. I. Arnalot and it is largely due to his efforts that the Abelujo-Klubo, Esperanto Library and Reading Room have just been started in Manila.

o

Dr. Zamenhof's opening speech we print in full—it will undoubedly claim the attention of our readers.

Speaking of the difficulties now happily passed, he said: "Soon we began more and more to be convinced that from theorists we must expect but little good for our affair; that all praise or blame from outsiders means but little for us; that we must trust our own strength, our own patience and constancy; that the world will come over to us only when it sees in us a power, when it sees that we are not groping in the dark; that we do not lose to-day what we gained yesterday—that our path is plain and straight, and that we never turn aside from it."

"But this strong conviction did not come all at once. At first, seeing how slow and difficult was our progress, many Esperantists thought that the cause lay in the language itself, and that if we only changed this or that detail the world would come to us in crowds. Then came the period of the great demand for reforms. Happily, that period did not last long. Esperantists soon perceived that it was wholly impossible to arrive at any common agree-

Digitized by Google

ment, silencing and satisfactory to all, as to the essentials of reform, and that the outside world, to which all the reformers' efforts were directed, remained totally indifferent to the question whether this or that detail had in our language one form or another; one soon became convinced that by reforming we should only lose all that we had hitherto acquired, and gain absolutely nothing. Then Esperantists firmly decided to say nothing more about any reforms. A certain very small number of malcontents forsook Esperanto, and together with a few non-Esperantists, who deemed themselves highly competent judges of the question of international language, began among themselves a discussion as to various linguistic details, which is not yet nor ever will be finished, and they stand now at the same point at which they stood fourteen years ago. All the rest of the Esperantists in full accord rallied firmly round the old standard, and from that time made a great, an immense advance.

"From the time when Esperantists ceased talking about reforms, a period ever increasingly brilliant began for Esperanto. At first, under the pressure of very great hindrances from outside, we progressed very slowly and painfully. But, under the influence of our complete internal harmony and our unwavering advance straight ahead, our forces more and more increased. We have now attained a position such as many of us ten years ago would not have dared even to dream of, and if we continue to march onward in the same harmony as heretofore, no power on earth can check our advance, and we shall fully attain our end. Every hour the number of our adherents increases, every day the number of our groups grows larger. Our literature grows so quickly and uninterruptedly that already many small nations might envy us. The practical use of our language becomes ever greater and greater. Only a short time ago people were altogether silent about us, and afterwards laughed at us; now everywhere they already respect us as an important power. Even those opponents on points of principle, who not long ago contemptuously regarded us from on high, now begin to cry an alarm.

"Our language itself is continually becoming more rich and flexible. One after another continue to appear new words and forms; some establish themselves in the language, others cease to be used. The whole thing goes on quietly, without shock and even unremarked. Variations in our language, in accordance with the diversity of the countries in which it is used, are nowhere apparent; and the more experienced authors become, the more of mutual similarity there is in their manner of using the language, in spite of the remoteness of their respective localities. Nowhere is there a break or flaw in the continuity of the language, old or new, and notwithstanding the fact that our language is strongly developing, every new Esperantist reads the works of twenty years ago with the same perfect ease as an Esperantist of that day."

* * *

"It has been my wish merely to point out that in our movement nothing is to be attained save by harmony and constancy."

* * *

"Let us remember that our congresses afford a preface, by way of practice and training, to the history of the fraternised humanity of the future. The important things for us are not some trifling external details of our language, but its essence, its idea and aim; therefore we must, above all, care for its uninterrupted *life*, for its ceaseless *growth*. Great is the difference between man as a child and man as a man; great, perhaps, will be the difference between the Esperanto of to-day and Esperanto after many centuries of evolution; but, thanks to our assiduous care, the language will vigorously live, in spite of all attacks its spirit will wax strong, its aim will be attained, and our patience wil be blessed by posterity."

A letter that we print in another column has been sent to us (in common with other Esperanto journals) by M. Ernest Archdeacon, (the well-known President of the French Aerial Club of Paris) in the joint interest of Aeronautics and Esperanto.

D-RO ZAMENHOF EN CHEMNITZ. Sabaton, la 22an de Augusto alia kunveno okazis, en kiu ĉeestis D-ro Zamenhof mem. Ĉirkaŭe 500 plej diversprofesiaj personoj plenigis la ĉambregon de la komercista unuiĝo. Je la 9a la Majstro alvenis kaj estis korege salutata. Li dankis per parolado, en kiu li diris, ke la Dresdena kongreso estis plena sukceso. Poste D-ro Zamenhof akceptis la honoran prezidantecon de la "1a Chemnitz'a Esperantista Societo." Sekvis diversaj paroladoj parte en germana, parte en esperanta lingvo. Multaj personoj aliĝis al la 4 malfermotaj kursoj. La Esperantistoj restis ankoraŭ kune kun la Majstro en agrabla kunveno beligita per kantoj kaj deklamoj.

Digitized by Google

Since our last issue we have received particulars of the first American Congress of Esperantists held in Chautauqua, where next year will be welcomed the Fifth Universal Congress. There were present, says the *Amerika Esperantisto*, delegates and Esperantists from a majority of the States of the Union, with a proportionately large number from Canada, whose border-line is only a few miles distant. The session opened in the immense amphitheater of Chautauqua Institute, which seats 6,000 persons. Besides Esperantists there were in the convention hall probably 1,200 other interested persons. The choir of two hundred voices sang "La Espero," and that beautiful hymn, re-enforced by the largest organ in the world, filled the room with the music of Esperanto. Dr. Vincent, head of Chautauqua Institute, in pleasant words gave the official welcome to the propagandists of the international language.

o

The Colonial Council of Cochin China has recently voted a sum of money for the publication an Esperanto gazette.

o

A circular from Argentina informs us that the "Sudamerica Biblioteko Esperanta" at Buenos Aires is publishing Esperanto works at regular intervals.

o

Congress Items

Never has the prospects of Esperantism been so bright as now after, the brilliant success of the Dresden Congress.

o

Next year's congress is to be held at Chautauqua, New York; another during the same year at Barcelona.

o

The King of Saxony consented to become High Patron to the Congress and expressed his sympathy with the idea sending a welcome to the Congress in a telegram to the assembled delegates.

o

The Emperor of Germany also sent a telegram showing himself in accord with the movement, besides which the delegates were informed that he had already expressed himself as being greatly interested in the affair.

o

Of great import is the official recognition given to Esperanto by the U. S. Government and the Japanese Government by the sending of their respective official delegates.

The French Society of Red Cross and the International Peace Society had their representatives there.

o

The Congress week was taken advantage of and made the occasion of meetings by about twenty different international bodies and societies, representing such diverse themes as Temperance, Free Thought, Catholicism, Journalism, Socialism, Collectors' Association, Stenography, Vegetarianism, Chess, Theosophy, Freemasonry and Commerce besides the very important meetings held in connection with the Red Cross (account of which appears on another page); International Science Association, Bible Translations and Theology, Teachers, Musicians and Police.

o

About two thousand esperantists attended the Lutheran Church on the Sunday afternoon—we are printing Dr. Kühn's sermon on another page. The Catholic service in the morning attracting also a large number.

o

Besides the performance of Goethe's Ifigenia in Tauris there were many Esperanto concerts given for the benefit of the visiting delegates—all considered most successful.

o

The Edison Phonograph Company had a representative to take "records" of the speeches for the purpose of getting typical pronunciations.

o

There are now 1057 Esperanto Societies, and 64 Esperanto gazettes—288 towns have Esperanto Consulates.

———

The following letter from the American Esperanto Association has been received since we last went to press.

Chautauqua, Nov.-Jorko
Al la La 23an Julio, 1908.
Sekretario de la Filipina Esper. Asocio.

La Esperantistaro de Nord' Ameriko, nun kunvenante en l' Unua Amerika Esperantista Kongreso, sendas al ĝiaj Filipinaj fratoj sian koran saluton! Ni jus audis tre interesan paroladon de via kaj nia samideano, D-ro H. W. Yemans, pri la kuraĝiga progreso de Esperanto en via lando. Vivu Esperanto, kaj vivu la Kvina Kongreso en Ameriko!

Je la nomo de la Konvenantaro,
Edward K. Harvey,
Sek. de la A.E.A

Digitized by Google

AKCEPTO DE D-ro ZAMENHOF

KAJ

MALFERMO DE LA KONGRESO

(GERMANA ESPERANTISTO)

La oficiala akcepto de D-ro Zamenhof per la plej eminentaj Esperantistoj kaj plej altaj ŝtataj kaj urbaj oficistoj okazis en la "Aulo" de la Teĥnika Lernejo lundon la 17an de Augusto je la 9h matene. Post tiu akcepta kunveno ĉiuj invititaj veturis per automobiloj al "Vereinshaus" kie fariĝis je la 10½a la solena publika malfermo de la kongreso.

Belega estis la ornamo, per kiu la granda festsalono de "Voreinshaus" estis ŝanĝita en vere internacian kunvenejon kaj parolejon. La muroj estis kovritaj de multkoloraj flagoj kaj insignoj de la plej diversaj nacioj. Sur la estrado estis starigita agrabla arbareto da verdaj plantoj, super kiuj etendiĝis lerte farita aranĝo da flagoj ĉirkaŭantaj la germanan aglon. La kontraŭa muro havis similan flagornamon kun la verda stelo en mezo.

Plenega estis la salono; en ĝoja ekscito la ĉeestantaro atendis la eniron de la Majstro. Jen li enpaŝas akompanata de la eminentuloj en Esperantujo kaj Dresden. Aplaŭdado, ne ankoraŭ audita en tiu salono kun tia viveco kaj konstanteco plenigis la aeron. La tonoj de la orgeno enmiksiĝis kaj la entuziasmo atingis sian plej altan gradon. Ĝuste iu Dresdena jurnalo rimarkigas, ke en tiu momento la internacieco havis triumfon ne ankoraŭ konatan en Germanujo.

Kolonelo Pollen, la prezidanto de la antaŭa kongreso unue ekparolis, malfermis la 4an kongreson kaj donis la prezidantecon al D-ro Mybs, kiu dankis la reĝon pro la akcepto de la protektado de l' kongreso kaj dankis la estrarojn pro la granda helpo kaj subteno faritaj al la kongreso. Sekvi la favora parolado, kiun faris Sekreta Konsilano Lange en la nomo de la Saksa registaro; li finis ĉirkaŭe per jenaj vortoj: "La lingvo estas la plej granda trezoro, donita al la homoj. Sed la diverseco de la lingvoj kvazaŭ malbeno premas la homaron. Tial ni deziras: Floru kaj kresku via verko."

Poste la ĉefurbestro, Financa Konsilano Beutler bonvenigis la fremdajn gastojn en Dresden. Li parolis pri la batalo inter la lingvoj; ĉiu volas superi la alian, neniu sukcesos. Tial estas granda kaj meritplena laboro enkonduki neutralan internacian lingvon. Certe la Dresden'a burĝaro bone komprenos la gravecon de tiu laboro kaj volonte akceptos la gastojn.

Nun stariĝis la Majstro, por fari sian grandan malferman paroladon. Li ripetis la dankon al la reĝo, al la ŝtataj kaj urbaj estraroj, al la Dresden'aj amikoj, kiuj tiel fervore kaj sukcese preparis la kongreson; precipe al la Kvaro por la Kvara, kiu sindoneme antaŭlaboris por la granda manifestado en Dresden.

Parolo de D-ro L. Zamenhof

Sinjorinoj kaj Sinjoroj!

Aperante antaŭ vi kiel tradicia malfermanto de la esperantistaj kongresoj, mi permesas al mi antaŭ ĉio esprimi la plej respektan dankon de nia kongreso al Nia Regnestra Moŝto la Reĝo Frederiko Augusto de Saksujo por la granda honoro, kiun li faris al ni, prenante sur sin la altan protektadon de nia kvara kongreso. Mi esprimas ankaŭ profundan dankon de nia kongreso al Sinjoroj la Ministroj kaj aliaj eminentaj personoj, kiuj bonvolis eniri en la honoran prezidantaron kaj honoran komitaton de nia kongreso. Mi esprimas ankaŭ nian dankon al tiuj landoj, kiuj sendis al nia kongreso oficialajn delegitojn, kaj al la alilandaj konsuloj, kiuj honoris nin per la reprezentado de iliaj landoj ĉe nia malferma kunveno. Nun la unuan fojon nia kongreso aperas sub la oficiala sankcio de regnestro kaj registraro; mi estas certa, ke la Esperantistoj alte taksos la gravecon de tiu ĉi fakto; mi esperas, ke ĝi estos komenco de tiu nova tempo, kiam nia ideo ĉesos esti penado de nur privataj personoj, sed ĝi fariĝos grava tasko por la registaroj de la mondo.

Digitized by Google

En la nomo de la kvara tutmonda esperantista kongreso mi salutas la landon germanan, kies gastoj ni ĉiuj estas en la nuna momento; precipe mi salutas la Saksan reĝlandon, kiu al ni, filoj de la plej diversaj landoj kaj gentoj, aranĝis belan akcepton en sia centro mem, en sia fama kultura ĉefurbo. Mi esprimas nian koran dankon al la Saksa registaro kaj precipe al la Dresdena urbestraro por la tuta helpo, kiun ili donis al nia kongreso, kaj por la saluto, kiun ili audigis al ni per siaj estimataj reprezentantoj.

Fine mi esprimas, certe en la nomo de ĉiuj esperantistoj, nian koran kamaradan dankon al niaj germanaj samideanoj kaj antaŭ ĉio al nia Kvaro por la Kvara, kiuj prenis sur sin la malfacilan taskon aranĝi nian kongreson ĝuste en ĉi tiu jaro, kiam ekzistis tiom da malhelpoj, kaj kiuj, dank' al sia granda sindoneco, aranĝis ĉion en la plej bona maniero kaj enskribis per tio tre gravan paĝon en la historion de nia afero.

Germanujo, la lando de la filozofoj kaj poetoj, kiu estis iam la centro de la humanistoj, havas por nia ideo specialan signifon per tio, ke en ĉi tiu lando, dank' al la neforgesebla granda merito de la pastro Johann Martin Schleyer, nia ideo ricevis sian unuan disvolviĝon kaj la unuan potencan puŝon antaŭen. Germanujo sekve estas la lulilo de la ideo de lingvo internacia. Ni, speciale esperantistoj, havis ankaŭ en Germanujo niajn unuajn plej gravajn batalantojn, Einstein kaj Trompeter. Estas vero, ke poste en la daŭro de tre longa tempo nia ideo en ĉi tiu lando ŝajnis tute mortinta; sed en la lastaj jaroj ĝi tie ĉi denove vigle reviviĝis, kaj ni havas plenan esperon, ke post nia nuna kongreso, kiam la Germanoj ekkonos nin pli proksime kaj konvinkiĝos per siaj propraj okuloj kaj oreloj, ke ni ne estas iaj teoriaj fantaziuloj, nia afero ĉi tie ekfloros ne malpli potence, ol en la aliaj grandaj landoj, kaj en la komuna ĉiuhoma afero Germanujo baldaŭ okupos unu el la plej honoraj lokoj.

Kara Samideanoj!

En la daŭro de la lasta jaro en nia afero okazis faktoj, kiuj maltrankviligis por iom da tempo la mondon esperantistan. Nun ĉio jam denove trankviliĝis. Nia arbo, pri kiu mi parolis en Kembriĝo, en la pasinta jaro plej konvinke montris sian tutan fortecon kaj sanecon, ĉar malgraŭ la tute ne atenditaj atakoj, kiuj en la daŭro de kelka tempo kauzis grandan krakadon, la arbo konservis sian tutan potencon kaj perdis nur tre malmultajn foliojn. Malgraŭ la kaŝite preparitaj kaj rapide plenumitaj atakoj, kiuj ne donis al niaj soldatoj la povon dece orientiĝi kaj interkomunikiĝi ĉiu el ili sur sia aparta loko staris forte kontraŭ ĉiuj forlogoj, kaj nur tre malmultaj lasis sin kapti per lertaj vortoj. Super la okazintaj faktoj ni povus sekve silente transiri al la tagordo. Tamen, por gardi niajn venontajn batalantojn kontraŭ similaj surprizoj, mi permesos al mi diri kelke da vortoj pri tiu temo. El la tempo pasinta ni ĉerpu instruon por la tempo venonta.

Pasis jam ĝuste tridek jaroj de la momento, kiam Esperanto unue aperis antaŭ malgranda rondo da amikoj; pasis jam dudek unu jaroj de la momento, kiam Esperanto unue aperis publike antaŭ la mondo. Tre malforta ĝi estis en la unua tempo; ĉiu plej malgranda bloveto povis ĝin renversi kaj mortigi. Ĉiu bona vorto de la plej sensignifa homo aŭ de la plej senvalora gazeto donis al niaj pioniroj esperon kaj kuraĝon; ĉiu atakanta vorto kauzis al ili doloron. Kiam antaŭ dudek jaroj la Amerika Filozofia Societo volis preni la aferon de lingvo internacia en siajn manojn, tio estis por la autoro de Esperanto tiel altega kaj neatingebla aŭtoritato, ke li, kiu tiam havis ankoraŭ la rajton disponi pri Esperanto, tuj decidis fordoni ĉion al la manoj de tiu societo, ĉar, estante tute sensperta, li tiam ankoraŭ ne sciis, kia grandega diferenco estas inter teorio kaj praktiko.

Feliĉe la entrepreno de la Amerika societo ne sukcesis. Mi uzas la vorton "feliĉe," ĉar efektive nun, kiam mi estas pli sperta, por mi estas afero tute senduba, ke, se la entrepreno de tiuj teoriistoj daŭrus iom pli longe, la tuta ideo de lingvo internacia jam de longe estus tute senkreditigita kaj enterigita por ĉiam, aŭ almenaŭ por tre longa, longa tempo.

Niaj pioniroj laboris, kaj la afero kreskis. Baldaŭ ni ĉiam pli kaj pli akiradis la konvinkon, ke de teoriistoj ni devas atendi tre malmulte da bono por nia afero; ke ĉiuj laŭdoj kaj mallaŭdoj de flankaj personoj havas por ni nur tre malgrandan signifon; ke ni devas fidi nur niajn proprajn fortojn, nian propran pacience kaj konstantecon; ke la mondo venos al ni nur tiam, kiam ĝi vidos en ni potencon, kiam ĝi vidos, ke ni ne palpas en mallumo, ke ni ne perdas hodiaŭ, kion ni akiris hieraŭ, ke nia vojo estas klara kaj rekta kaj ni de ĝi neniam deflankiĝas.

Sed ne per unu fojo ni venis al tiu fortika konvinko. En la unua tempo, vidante, ke nia afero progresas tre malrapide kaj malfacile, multaj esperantistoj pensis, ke la kauzo de tio kuŝas en nia lingvo mem, ke, se ni nur ŝanĝos tiun aŭ alian detalon, la mondo tuj venos al ni en granda amaso. Tiam venis la periodo de la granda postulado de reformoj. Feliĉe tiu periodo daŭris ne

Digitized by Google

longe. La esperantistoj baldaŭ konvinkiĝis, ke veni al ia komuna, ĉiujn kontentiganta kaj silentiganta interkonsento pri la esenco de la reformoj estas tute ne eble, kaj la ekstera mondo, kiujn la reformemuloj celis, restis absolute indiferenta koncerne tion, ĉu tiu aŭ alia detalo havas en nia lingvo tian formon aŭ alian; oni baldaŭ konvinkiĝis, ke per reformado ni nur perdos ĉion ĝis nun akiritan kaj gajnos absolute nenion. Tiam la esperantistoj firme decidis ne paroli plu pri iaj reformoj. Kelkaj tre malmultaj malkontentuloj forlasis Esperanton kaj kune kun kelkaj ne-esperantistoj, kiuj rigardis sin kiel plej kompetentajn en la afero de lingvo internacia, komencis inter si ĝis nun ankoraŭ ne finiĝintan kaj neniam finiĝontan diskutadon pri diversaj lingvaj detaloj, kaj ili staras nun sur tiu sama punkto, sur kiu ili staris antaŭ dekkvar jaroj. La tuta cetera esperantistaro en plena harmonio forte grupiĝis ĉirkau sia konstanta standardo kaj faris de tiu tempo grandan, grandegan marŝon antaŭen.

De la tempo, kiam la esperantistoj ĉesis paroli pri reformoj, komenciĝis por Esperanto periodo ĉiam pli kaj pli brilanta. En la komenco, sub la premo de tre grandaj malhelpoj eksteraj, ni progresadis tre malrapide kaj malfacile. Sed sub la influo de nia plena interna harmonio kaj nia nedekliniĝa irado rekte antaŭen, niaj fortoj ĉiam pli kaj pli kreskis. Nun ni atingis tian potencon, pri kiu multaj el ni antaŭ dek jaroj ne kuraĝis eĉ revi, kaj se ni marŝos en tia sama harmonio kiel ĝis nun, nenia forto en la mondo povos haltigi nian iradon, kaj ni plene atingos nian celon. Ĉiuhore kreskas la nombro de niaj partianoj, ĉiutage pligrandiĝas la nombro de niaj grupoj. Nia literaturo kreskas tiel senhalte kaj rapide, ke multaj malgrandaj nacioj jam nun povas nin envii. La praktika uzado de nia lingvo fariĝas ĉiam pli kaj pli granda. Dum ankoraŭ antaŭ ne longe oni tute silentis pri ni kaj poste oni nin mokis, nun oni jam ĉie nin respektas, kiel grandan potencon. Eĉ tiuj niaj principaj kontraŭuloj, kiuj antaŭ ne longe malŝate rigardis nin de alte, nun jam krias alarmon.

Nia lingvo mem konstante pli riĉiĝas kaj elastiĝas. Iom post iom konstante aperas novaj vortoj kaj formoj, unuj fortikiĝas, aliaj ĉesas esti uzataj. Ĉio fariĝas kviete, senskue kaj eĉ nerimarkeble. Nenie montriĝas ia diferenciĝado de nia lingvo laŭ la diversaj landoj, kaj ju pli spertaj fariĝas la autoroj, des pli similiĝas reciproke ilia uzado de nia lingvo, malgrau la granda malproksimeco de iliaj lokoj de loĝado. Nenie rompiĝas aŭ difektiĝas la kontinueco inter la lingvo malnova kaj nova, kaj malgrau la fakto, ke nia lingvo forte disvolviĝas, ĉiu nova esperantisto legas la verkojn de antaŭ dudek jaroj kun tia sama perfekta facileco, kiel esperantisto tiutempa, kaj li eĉ ne rimarkas, ke tiuj verkoj estas skribitaj ne nun, sed en la unua, sufinfana periodo de nia lingvo.

Nia afero regule kaj trankvile iras antaŭen. La tempo de la teoriaj juĝoj kaj de kliniĝado antaŭ ŝajnaj autoritatoj jam de longe pasis. Se iu nun esprimas sian opinion aŭ konsilon pri Esperanto, oni jam ne demandas, ĉu li estas homo grandfama au ne,—oni nur demandas, ĉu liaj konsiloj estas konformaj al la naturaj bezonoj kaj la natura irado de nia lingvo aŭ ne. Se iu glornoma persono en plena nesciado de nia afero esprimas iun el tiuj sensencajoj, kiujn ni jam tiel ofte audis, ekzemple, ke arta lingvo estas utopio, ke la esperantistoj sin reciproke ne komprenas, k.t.p., au se li, forgesante la nunan staton de Esperanto kaj la teruran ekzemplon de la Volapuka akademio, postulas, ke ni rebaku la tutan lingvon lau lia teoria recepto,—tiam ni, esperantistoj, indiferente ĉion auskultas kaj trankvile iras nian vojon.

Ne por fieri pri nia forteco mi diras ĉion ĉi tion: neniu el ni havas la rajton esti fiera, ĉar nia forteco ne estas la merito de iu el ni aparte, sed ĝi estas nur la rezultato de multejara pacienca laborado de *multo* da personoj. Mi volis nur atentigi vin pri tio, ke en nia afero ĉio povas esti atingita nur per harmonio kaj konstanteco. Se nin ne gvidus fera konstanteco, nia lingvo jam de longe ne ekzistus, kaj la vortoj "lingvo internacia" estus nun la plej granda mokatajo por la mondo.

La longa kaj malfacila batalado nin hardis, kaj ne sole la voĉoj de apartaj personoj, sed eĉ la premo de ia granda potenco nun jam ne povus deklini la esperantistaron de ĝia klara kaj rekta vojo. Kia do estas la kaŭzo, ke en la pasinta jaro en nia tendaro subite naskiĝis tia granda vento, kiu en la dauro de momento minacis alporti al ni tiom da malbono? Kiu estis tiu ŝajne grandega forto, kiu por momento enportis tian neatenditan konfuzon en nian mezon? Nun, kiam ĉio jam klariĝis, ni povas konfesi, ke ĝi ne estis ia eksterordinare granda potenco, ĝi estis simple kelkaj malmultaj personoj; sed la danĝereco de ilia atako konsistis en tio, ke tiu atako ne venis malkaŝe el ekstere, sed ĝi estis kaŝite preparita kaj tute neatendite aranĝita *interne* de nia tendaro.

Gi estas historio, pri kiu mi ne volas paroli. Nun mi volas nur diri jenon: ni ĉiuj estas

Digitized by Google

reprezentantoj de la ideo de lingvo internacia, ni faru kun ĝi, kion ni volas, sed ni agu honeste kaj ni memoru, ke pri niaj agoj la estonteco severe nin juĝos. Memoru, ke Esperanto estas nenies proprajo, ke la esperantistoj havas plenan rajton fari kun ĝi ĉion, kion ili volas, se ili nur faros ĝin singarde, lojale kaj interkonsente. Nur por gardi nian lingvon kontrau anarhio de la flanko de apartaj personoj, nia lingvo havas sian plej senpartie elektitan kaj el plej kompetentaj personoj konsistantan kaj konsistontan Lingvan Komitaton, kiu, dependante de neniu mastro, havas plenan rajton kaj plenan povon esplori kaj prezenti al la sankcio de la esperantistaro ĉion, kion ĝi volos. La Bulonja Deklaracio malpermesas nur, ke apartaj personoj rompu la lingvon *arbitre*, ĝi estas kreita nur por gardi la ekstreme necesan *kontinuecon* en nia lingvo. Se iu el vi trovas, ke ni devas fari tion au alian, prezentu vian deziron al la Lingva Komitato. Se tiu Komitato ŝajnos al vi tro konservativa, tiam memoru, ke ĝi ekzistas ne por la plenumado de diversaj personaj kapricoj, sed por la gardado de la interesoj de la tuta esperantistaro; ke pli bone estas, ke la Komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon, kiu povus malutili al nia tuta afero. Ĉar vi ĉiuj konfesas, ke la esenco de nia lingvo estas ĝusta kaj oni povas disputi nur pri detaloj, tial ĉio bona kaj ĉio efektive necesa povas facile esti farata en ĝi per vojo lojala, en harmonio kaj paco.

La personoj, kiuj volas altrudi al la tuta esperantistaro siajn dezirojn, diras ordinare, ke ili havas la plej bonajn ideojn, kiujn la plimulto da esperantistoj certe aprobus, sed iaj ĉefoj ne volas ilin auskulti kaj ne permesas al ili prezenti siajn ideojn por esplorado. Tio estas ne vera. Vi scias, ke lau la nova ordo, kiun per komuna voĉdonado akceptis por si nia Lingva Komitato, ĉiu homo ne sole havas la rajton prezenti al la Komitato siajn proponojn, sed se la propono havas eĉ nur plej malgrandan ŝajnon de seriozeco, se inter la cent membroj de la Komitato la propono akiris por si eĉ nur la aprobon de *kvin* personoj, tio jam sufiĉas, ke la Lingva Komitato estu *devigata* esplori tiun proponon. Vi vidas sekve, ke neniu povas plendi, ke oni lin ne auskultas au ke iaj ĉefoj prezentas al voĉdonado nur tion, kion *ili* deziras.

Se iu diras al vi, ke oni devas ĉion krude rompi, se oni per ĉiuj fortoj kaj per ĉiuj eblaj rimedoj penas malkontentigi vin; se de la vojo de severa unueco, de tiu sola vojo, kiu povas konduki nin al nia celo, oni penas forlogi vin,—tiam gardu vin! tiam sciu, ke tio kondukas al malordigo de ĉio, kion multaj miloj da personoj atingis por la granda ĉiuhoma ideo per multejara pacienca laborado.

Mi finis. Pardonu al mi la malagrablan temon, kiun mi elektis. Ĝi estas la unua kaj espereble ankaŭ la lasta fojo en la historio de niaj kongresoj. Kaj nun ni ĉion forgesu; ni komencu la grandan feston, por kiu ni ĉiuj kunvenis el la diversaj landoj de la mondo; ni ĝoje pasigu nian grandan ĉiujaran semajnon de la pure homara festo. Ni memoru pri tio, ke niaj kongresoj estas ekzercanta kaj edukanta antaŭparolo por la historio de la estonta interfratigita homaro. Por ni estas grava ne iaj bagatelaj eksteraj detalajoj de nia lingvo, sed ĝia esenco, ĝia ideo kaj celo, tial ni antaŭ ĉio devas zorgi pri ĝia seninterrompa *vivado*, pri ĝia senhalta *kreskado*. Granda estas la diferenco inter homo-infano kaj homo-viro; granda eble estos la diferenco inter la nuna Esperanto kaj la evoluciinta Esperanto de post multaj jarcentoj; sed dank' al nia diligenta gardado, la lingvo fortike vivos, malgraŭ ĉiuj atencoj, ĝia spirito fortiĝos, ĝia celo estos atingita, kaj niaj nepoj benos nian paciencon.

✦ ✦ ✦

Post la vortoj de la Majstro ripetiĝis la entuziasma aplaŭdo, kaj nun la diversaj delegitoj parolis. Per oficialaj delegitoj estis reprezentataj Japanujo (Prof. Shimura), Usono (Majoro Straub), la Ruĝa Kruco (S-ro Meunier), la Internacia Pacifista Societo (S-ro Moch); plue parolis delegitoj de la Esperantistoj en Barcelono, Aŭstrujo, Hungarujo, Belgujo, Flandrujo, Anglujo, Irlando, Kanado, Malto, Skotlando, Bulgarujo, Brazilujo, Ĉilo, Danujo, Islando, Francujo, Tuniso. En la nomo de la aŭstraj germanoj Prof. Simon. La delegitoj el Hispanujo, Italujo, Portugalujo, Norvegujo, Rusujo, Polujo, Serbujo, Svedujo kaj Svisujo devis pro manko da tempo prokrasti siajn salutparolojn ĝis la unua agada kunsido. S-ro Moch poste legis cirkaue 40 telegramojn alvenintajn el ĉiuj partoj de l' mondo. Oni decidis sendis saluttelegramoj al iliaj Moŝtoj la imperiestro de Germanujo kaj la reĝo de Saksujo. (Ambaŭ telegramoj estis afable respondataj.) La vere grandioza malferma soleno finiĝis nur post pli ol duhora daŭro.

Digitized by Google

LA RELIGIAJ DIVERSOJ

Kiel dum la lastaj jaroj la Dimanĉa tago estis dediĉita al la solenaj Diservoj, kaj la gekongresanoj ĉeestis tre multnombraj en la diversaj preĝejoj. Dank' al la senlaca sindonemo de Sinjoro von Frenckell, kiu tre ageme kaj tute sole prenis sur sin la malfacilan taskon organizi la programojn, la muzika parto de la religiaj ceremonioj tute belege sukcesis.

La katolika Diservo okazis je la 10a en la preĝejo de la Sankta Koro de Jesuo (Herz-Jesu-Kirche).

Dum la meso oferita de S-ro abato Richardson oni unue audis la tute rimarkindan ĥoristaron (la Dresdena Liedertafel), kiu kun sento kantis belegan ĥoron de Beethoven "La honoro de Dio el la naturo." La belaj voĉoj, kantante kapermaniere, naskis ĉe la ĉeestantaro tre grandan impreson. Aliaj religiaj kantoj estis kantitaj de S-ro Gotardo (Patro nia) kaj S-ino Guivy (Himno). En la "trio" eltirita el la ĥoroj, kiujn Mendelssohn verkis por "Atalio," kaj kies parolojn esperantigis D-ro Noel, Sinjorino Sahla bonvolis en la lasta momento pruntedoni la multevaloran helpon de sia tre bela voĉo. Fine la ĉeestantoj havis la grandan ĝojon audi la reĝan kamerkantistinon, Sinjorino Minnie von Frenckell, kies ĉarma kaj tute mirinde belsona voĉo kantis kun granda impreso la delikatan kaj harmoniplenan kanton de Hugo Wolf, "Dormanta Jesuknabo."

Post la meso la tre respektinda kanoniko Pichot, paroĥestro de sankta Devoto, en Monako, faris belan kaj tre altan predikon, kies simbola senco povis rilati al Esperanto la universa lingvo de ĉiuj fideluloj.

La orgeno estis tre lerte ludita de S-ro Pembaur, reĝa orgenisto, aranĝita de Franz Liszt sub la direkto de S-ro Kurt Blumentritt. La forta voĉo de Fraulino Apitz naskis tre religian movadon.

En la preĝejo de la Sankta Kruco okazis, je la duono de la dekdua, la lutera Diservo. Ĝin komencigis tre bela kanto "Laudu ni Dion" kantita de la tuta ĉeestantaro kaj tre bone esperantigita de S-ro Marx; S-ro Elb esperante tradukis preskaŭ ĉiujn aliajn religiajn kantojn kantitajn en la du preĝejoj. Poste lautiĝis la bela kaj tre varma voĉo de Fraulino Susanna Apitz en la kantiko "La Ĝiopovo" lau la muziko de Franz Schubert por vira ĥoro, orĥestro kaj orgeno; ĉiuj laudis la belegan ludadon de tiu grava muzika verko. Inter la strofoj de la kanto "Kor' kun koro kunigita" okazis tre altsenta prediko de la pastro Licto. Kuhn, kies emocieco konvinkis la ĉeestantaron ke Esperanto estas la vera lingvo de la internacia religia sento.

Kaj kiel tio okazis en la lastaj kongresoj, la esperantistoj, kiuj ĉeestis la du Diservojn certe konservos en sia koro bonan memoron de tiuj ceremonioj, dum kiuj la voĉoj de grandaj kaj veraj artistinoj aldonis al la religia sento tute noblan kaj artan impreson.

BARONO F. DE MENIL,
(*En la Kongresa Gazeto.*)

PREZENTADO DE "IFIGENIO EN TAURIDO"

Malfacile ni trovos la konvenajn vortojn, por esprimi nian grandan sinceran ĝojon pri la mirinde bela sukceso de la plej grava entrepreno de la 4a kongreso. Senpacience la esperantistoj atendis tiun okazajon, la prezentadon de unu el la plej klasikaj kaj belegaj dramoj de Goethe en nia esperanta lingvo. Entuziasme ni konvinkiĝis, ke ni ne trompis nin en nia espero, ke ni prave konfidis al la famega kaj lerta aktoro, tiel kore sindonema al nia ideo, Emanuel Reicher, kiu multe superis ĉion, kion antaŭvidis eĉ nia plej postulanta espero.

Merkredon, la 10an de Augusto, la grandioza reĝa operdomo estis plenigata de la diversnacia kongresanaro kaj de multaj el la Dresden'aj enloĝantoj. Super ĉiuj regis solena ĝojo pri la belega entrepreno nun tuj efektivigota, kiam eksonis, sub la direktado de S-ro von Schuch, la agrabla uvertura muziko de Gluck. Leviĝis la kurteno; belega scena bildo prezentiĝas. Ni vidas la densan kaj antikvan arbareton; dekstre larĝa ŝtuparo kondukas supren al la templo de Diano. Malantaŭe entendiĝas la vasta maro, kies bluajn ondojn alpelas la ventō Jen, el la templo elpaŝas la pastrino, Ifigenio, lautigante siajn ĝemojn kaj soprojn al la malproksima Greka lando.

Ni ne povas imagi, nek lau la ludado, nek lau la bonsona voĉo, aktorinon pli konvenan por tiu rolo ol F-ino Hedwig Reicher. Mirinde ŝi kunligis la klasikecon kun vere moderna sentado, la ĉarman virinecon kun vere moderna sentado, la ĉarman virinecon kun la indeco de pastrino, la amon al la kara patra lando kaj al la parencoj kun la amo al la lando, kiu gastame akceptis ŝin, kun la amo al tiu nobla reĝo, kiu estis por ŝi dua patro.

La reĝo Toas, prezentata de S-ro Emanuel Reicher, estis la princo de la sovaĝa barbara gento, tamen la nobla viro, por kiu nenio homa estas fremda. Kortuŝante li montris sian amon al la forpelita orfino, la amon kiu ŝanceliĝas inter patra amo al la zorgatino kaj la amo al silenta fianĉino. Kiam tiu ĉi

Digitized by Google

lasta amo estas rifuzita al li, la komencaj ĉagreno kaj kolero iom post iom malaperas, kaj fine triumfas tiu pure patra amo de la rezignanta maljunulo.

S-ro Bruno Decarli prezentis al ni same idealan Oreston. La malfeliĉa junulo, persekutata de la furioj pro mortigo de la patrino, vekas nian sinceran kompaton plej grandan en tiu momento, kiam frenezeco kaptas lin denove en plej terura grado. Kaj kune kun li ni spiras freŝon bonodoran, kiam li resaniĝis en la brakoj de la fratino preĝanta por li al al dioj.

Kontraŭe al la peza, malluma, premata karaktero de Oresto S-ro Kurt Stark lerte kaj simpatie prezentis la ĉiam esperplenan, facilmoveblan, eĉ en la malfeliĉo gajan sentimenton de la fidela amiko Pilado, al kiu ankaŭ Ifigenio havas baldaŭ grandan konfidon, kiu ŝajnas ŝanĝi en ekĝermantan amon.

S-ro Oskar Fuchs prezentis bonege la konfidulon de la reĝo, la sindoneman Arkas, kiu bone komprenas la silentan doloron de sia reĝo kaj provas prepari lian aspiron al Ifigenio. Ĉe li pli multe superas la barbaro tamen nobla, ol ĉe la reĝo, kiun venkas Ifigenio per sia granda konfido kaj amo.

La tuta aranĝo de la dramo estis belega kaj vere inda. Ni ne vidis la kutiman troklasikan rigidan prezentadon, sed ni havis antaŭ ni vivplenajn, naturajn scenojn; ni ne audis monotonan deklamadon, sed la sentesprimojn de realaj homoj, ilian veran ĝojon kaj malĝojon. Kaj nia lingvo festis triumfon; ĝi defluis belsone kaj nature de la lipoj de l' aktoroj; ĝi unuafoje komunikis al internacia ĉeestantaro la profundajn pensojn de la granda Goethe; ĝi montris sin inda alkonduki ne nur la de Goethe revitan "Weltliteratur" (tutmonda literaturo), sed eĉ krei laŭ la ideo de nia estimata Reicher la "Weltheater" (tutmondo teatro.)

La unua grava eksperimento mirinde sukcesis. Samideanoj, montru vian dankon al Emanuel Reicher per tio, ke vi helpas por la daŭra efektivigado de "Welltheater" (tutmonda teatro)!—*O. L.*

(Germana Esperantisto.)

PRESS NOTICES

FROM "DAS ECHO" (TRANSLATION)

Several days already before the formal opening the whole town (Dresden) was under the ban of the green star, the badge of the esperantists, the symbol of esperantism. From the balconies of the large hotels, out of the windows of the boarding houses the white-green flags were greeting so cordially as if a great festival was to be celebrated. Only the green star with the white E in the upper white square pointed out the meaning of all these decorations:— the celebration of the "IV Internacia Kongreso de Esperanto."

Car after car, crowded with Esperantists are arriving at Dresden, and everywhere the euphonious sounds of the language are heard. The policemen that were instucted in the language are on duty on the main streets and are doing excellent service, they are distinguishable by the Esperanto star on the sleeve. The Technical High School at Bismarckplatz has suddenly been converted into an International Congress Museum, offering ample opportunity of making studies full of interest. The most diverse races are here assembled: Romans, Germans, Slavs, Asiatics, all conversing in the new world's idiom as if they were speaking their own mother-tongue. By the side of Albion's haughty daughter you will find a Frenchman; both are apparently absorved in a conversation of deep interest, the young Gallic gesticulating with an eloquence that might indeed be termed extraordinary. The another group of interest: a fair Swedish girl, two Russians a young Spaniard and quite a number of elegant French woman of distinguished appearance are chatting together.

The fluency and perfection that the Esperanto language has attained in a short time is indeed astonishing. This language so rich of vowels is filling the rooms and you are getting the impression of being either in Spain or Rome. The exhibition of the Esperanto literature was opened in the morning, at 11 o'clock. There you can see the first book in Esperanto, printed in Nuremberg in 1899; further text-books of the different nations, Spain, Chile, England, Scandinavia, Mexico, Japan, China, etc., literature of the Red Cross are on exhibit as well as scientific and statistical books, charts, maps, note-books, the first two copies of the magazine "La Bela Mondo" just founded at Dresden, and a satirical periodical "La Spritulo," published at Leipzic. Even the blind are getting acquainted with the Esperanto language by means of books specially adapted for their instruction. A most singular method by Dr. Hanauer is attracting attention. Messrs. Seidel & Naumann of Dresden, the famous manufacturers of sewing machines and bicycles, are exhibiting a catalogue most tastefully arranged, of which an issue of 300,000 copies has been printed. Some other business concerns too have arranged smaller exhibitions on the same premises

Digitized by Google

Kvara Esperantista Kongreso

(British Esperantist)

Oficialaj Reprezentantoj.

La Kvara estis rimarkinda en tio, ke en ĝi partoprenis pli multe da oficialaj reprezentantoj de eksteresperantaj aferoj, ol en antaŭaj kongresoj. Al la Tria sendis reprezentanton unu regno, Belgujo; al la Kvara, du. Unu estis la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, kiu sendis oficialan reprezentanton en la persono de Majoro Straub. Ĝar li ne parolis nian lingvon, la varma saluto, kiun li alportis en la nomo de la Respublika Registaro, estis tradukita esperanten de S-ro L. B. Luders el Filadelfio. La alia regno reprezentanta estis Japanujo, en kies nomo (kaj speciale en tiu de la Ministraro de l' publika instruado) parolis esperante D-ro J. Shimmura, profesoro en la Universitato de Tokio. Poste la saluto de la Provinco de Barcelono, Hispanujo, estis transdonita de S-ro Pujulá y Vallès; S-ro Moynier parolis en la nomo de la franca societo de la Ruĝa Kruco; kaj S-ro Gaston Moch por la Internacia Oficejo de Paco en Berne, reprezentanta ĉiujn Pacosocietojn de la mondo.

La Telegramoj

Multaj miloj da Esperantistoj—kompreneble—ne povas korpe ĉeesti ĉiun Kongreson; ili do salutas siajn pli feliĉajn samideanojn per telegramo. De ĉiuj partoj de la globo alflugas en granda nombro iliaj fervoraj vortoj. Tiun ĉi jaron S-ro Moch legis interalie esperantajn telegramojn el Warsaw, Bremen, Spokane (Ameriko, invitas la Kvinan), Lisbono (la Portugala Biciklista Unuiĝo), Köln, Bielefield, Brunnen, Pilsen (Laborista Klubo), Karlsbad, Berne, Lwow, Meksiko, la Franca Ruĝa-Kruco Societo (de Admiralo Bayle kaj Generalo Prioux), Kopenhago (de la tieaj Policanoj), Peterburgo, Patros (Grekujo), Murcia, Londona Klubo, D-ro Cunningham, S-ro Duchochois, Bradford, k.t.p.

Al D-ro Mybs oni komisiis sendi je la nomo de la Kongreso telegramojn de saluto al la Reĝo de Saksujo kaj al Lia Imperiestra Moŝto Vilhelmo II, kiu laŭ S-ro Reicher interesiĝas al nia afero.

La Delegitoj

Nun alpaŝis al la tribuno longa vico da naciaj delegitoj. Ĉiu alportis varman saluton kaj certigon pri fideleco. La landoj reprezentitaj estis: Aŭstrio-Hungario, D-ro Polak (la *bohema* lingvo de S-ro Cejka, *germana* de Prof. O. Simon, *hungara* de S-ro Mickeso); Belgujo, S-ro Blanjean, kaj la *flandra* lingvo de S-ro Van der Beest; Granda Britujo, S-ro Mudie (kiu citis pri la Doktoro la diron de la latina poeto: Si monumentum quaeris, circumspice!), *Gibraltaro kaj Hindujo*, D-ro Pollen, *Irlando*, Pastro Parker, *Kanado*, S-ro Bardorf, *Malto*, S-ro H. B. Mudie, *Skotlando*, S-ro Page (kiu kiel saluton deklamis al la Kongreso poemon speciale verkitan de poetino A. B. Deans en Edinburgo); Bulgarujo, Leŭtenanto Haralembev; Brazilujo, D-ro Backheuser; Ĉilujo, D-ro Schmidt; Danujo, S-ro V. Bendix, *Islando*, S-ro Guldbrandsen; Francujo, S-ro Durieux, *Tunislando*, S-ro Combet Germanujo, Pastro Kuhn; Hispanujo, Kapitano Perigordo (invitas la Kvinan al Hispanujo—Burgos), *Kataluna* lingvo, S-ro Klaramunte; Italujo, F-ino Rosa Junck; Japanujo, D-ro Kroita (invitas la Kongreson por la jaro 1912); Meksikujo, S-ro Jules Borel; Monako, S-ro Kanoniko Pichot; Norvegujo, S-ro Thomsen; Portugalujo kaj Madeira, Pastro Schmitz; Rumanujo, D-ro Fisher; Rusujo, S-ro Evstifejeff (ankaŭ parolas pri la 80-a naskotago de Grafo Leo. Tolstoj; li diris, ke Tolstoj estas ankorau samideano kaj salutas la Kongreson ne nur per vortoj sed per fakto. Kvazau por signi la plenaĝiĝon de Esperanto, kiu en tiu ĉi jaro atingas sian dudek-unuan jaron, la grava eldonista firmo por la verkoj de Tolstoj jus starigis novan serion de esperantaj kaj priesperantaj libroj; plie li anoncis, ke Prof. Baudouin de Courtenay, kiel ĉiu nobla homo partiano de nacia egalrajteco, donis permeson al li (S-ro Evstiejeff) traduki siajn broŝurojn pri tiu temo kaj afable proponis al la tradukonto sian personan helpon al la laboro. Lau propono de D-ro Mybs, oni aklame decidis sendi respektan samideanan saluton al nia malnova kaj maljuna kunbatalanto Grafo Tolstoj), la *finna lingvo*, S-ro Sannstrom, la *gruza* (Kaukazo), S-ro V. Gogneliani, la *pola*, S-ro Grabowski; Serbujo, S-ro Javanovich; Svis jo, la *germana* lingvo, S-ro Schmidt, la *franca*, S-ro Privat; Svedujo, S-ro Nylén; Unuigitaj Ŝtatoj, Prof. Grillon [ankau parolis pri la starigo de la Esperanto Society of

Digitized by Google

North America kaj oficiale invitis la Kvinan Kongreson veni al Chautauqua, New York State.]

Ĉar la nombro de la delegitoj estis tiel granda, kaj multaj el ili havis tiom por diri, oni devis prokrasti duonon de la salutoj ĝis la sekvonta mateno.

Tiel finiĝis la solena malferma kunsido, grava kaj imponanta pruvilo al la mondo, ke en la Esperantistaro, malgrau ĝia konstanta senlima disvastiĝo, regas la plej firma kunlaboremo kaj solidareco, kaj ke oni povas aliĝi al nia lingvo kun plena certeco, ke ĝi estas jam praktike efika forto vivanta kaj nesancelebla, kiun oni tute ne intencas disfaligi per la enkonduko de iaj arbitra ŝanĝaĉoj de kelkaj kabinetuloj.

La Agadaj Kunsidoj

La salutojn de la delegitoj sekvis la unua agada kunsido. Post la legado resuma de protokolaro de la antaua Kongreso, kaj la legado de multaj pluaj telegramoj, S-ro Moch klarigis projekton pri starigo de konstanta kaso de la Kongresoj, detalojn pri kiu oni trovos en la 3a numero de la *Oficiala Gazeto*. Generalo Sébert kaj S-roj Dejean kaj Mudie ankau parolis pri tiu temo.

Je tiu momento D-ro Mybs interrompis la kunsidon por legi leteron de la Reĝo de Saksujo, kiu dankis la Kongreson pro ĝia saluta telegramo, kaj esprimis sian plenan simpation al nia afero.

Poste okazis diskuto pri diversaj projektoj rilataj al la instruado de Esperanto; oni elektis kiel kuratorojn de la kaso por la venonta Kongreso Generalon Sébert, S-rojn Mudie kaj Mybs; kaj S-ro Moch anoncis, ke la konata firmo la Edison Fonografa Kompanio sendis por havi cilindrajn impresojn de la esperanta elparolado kiel normajn tipojn de internacia parolmaniero.

Neeble estas, priskribi alie ol skize ĉion, kio priparoliĝis dum la du sekvintaj agadaj kunsidoj, vendredon kaj sabaton. Prof. Roy parolis pri la progreso de Esperanto en la teritorio de Neutra-Moresnet. Li proponis, ke same kiel la muzika mondo havas sian Bayreuth, tiel ankau la mondo ĝenerala havu kunvenejon sian Esperantan 'Bayreuth," en Amikejo. S-ro Ladévèze, el Hamburgo, kontrauparolis, rimarkigante, ke unu el la plej gravaj ecoj de Esperanto estas ĝia neutraleco, kiu lau li estos metata en danĝero per tia projekto. Pri tiu ĉi punkto la opinioj de la kongresanoj ŝajnis esti tre diversaj, kaj oni fine preterlasis la aferon sen definitiva decido.

D-ro Mybs legis gratulajn telegramojn de la Germana Imperiestro kaj de la Duko de Connaught.

Tiam D-ro Banks, oficiala delegito de la Filipinaj Insuloj, ne povinte, pro malfrua alveno, saluti la Kongreson kune kun la aliaj delegitoj, parolis pri la sukcesa antauenirado de Esperanto en la Insuloj, kie nun ekzistas pli ol 700 anoj el ĉiaj gentoj, brunaj, flavaj, blankaj, tute sen ia diferencigo pro rango societa au profesia. Li diris, ke la Ministro de la Publika Instruado intencas tre baldau enkonduki Esperanton en la lernejojn de la Insularo.

En la sama kunveno, la Kongreso, konstatante, ke malgrau senfinaj ĉiujaraj diskutadoj, oni ne povas veni al iu definitiva kontentiga decido pri la dato de oficiala internacia Festotago Esperanta, unuanime decidis, lau propono de S-ro Chavet, ke oni ne plu diskutu tiun aferon.

En la lasta oficiala kunsido, sabaton, lau la propono de S-ro Boirac, la Kongreso unuvoĉe sendis tre koran saluton al la iniciatoro de niaj ĉiujaraj festoj, S-ro Michaux en Boulogne.

S-roj Chavet kaj Moch anoncis la starigon, dum la Kongreso, de kelkaj novaj societoj: Internacia Societoj de Nemetiaj Instruantoj de Esperanto, la Societo Internacia de Liberpensuloj, la Vegetara Societo Internacia, kaj la Tutmonda Kuracista Asocio. Raportoj estis ankau legitaj pri la faroj de la Komitato de Biblia Tradukado, de la Internacia Scienca Asocio, kaj fine pri la kunsidoj de la Lingva Komitato kaj la nove fondita Akademio. Oni trovis aliloke en tiu ĉi numero la plenan tekston de tiu gravega raporto, kiu estis aklame akceptita de la kongresanoj, speciale tiu parto, kiu aludas al la celo kaj rolo de la Lingva Komitato. Lau rekomendo de D-ro Hanauer, oni decidis, ke tiu raporto estu eldonata en ĉiuj naciaj lingvoj.

Abato Richardson el Bruselo proponis, ke oni petu al la Centra Oficejo, fari apartan presajon de la raporto pri la Lingva Komitato, aperinta en la 3a numero de la *Oficiala Gazeto*, kaj sendi ĝin al ĉiu grupo de la mondo. Li diris: "La klera prezidanto en tiu ĉi raporto majstre kaj klare montras al la mondo tion, kion li prave nomas 'la komedio de la Delegacio.' Tiuj detaloj estas ĝis nun malmulte konataj en la Esperantistaro, kaj ili ekscitos certe la indignon de ĉiu honesta homo." Tiun proponon la Kongreso aklame akceptis.

S-ro Chavet legis la financan raporton de la Organiza Komitato, kiu rekomendis la starigon de Internacia Financa Societo por ĝin subteni.

Kiel la lastan jaron en Cambridge, S-ro H. J. Forman ankau tiun ĉi jaron kore invitis la Esperantistaron okazigi la Kvinan Kongreson en Ameriko. Li diris, ke oni

Digitized by Google

jam kolektis grandan sumon da mono por tiu celo, kaj li promesis la koran kunhelpadon de la *North American Review* por la sukcesigo de la afero.

Montrante tiel la vetfervoremon, kiu nun ekzistas por gastigi nian anaron, tuj post li stariĝis S-ro Pujulá y Vallés (Kataluno) kaj Kapitano Perigordo (Hispano), kiu en vera Esperantisma unueco, je la nomo de la du Hispanujaj societoj, invitis la Kvinan Kongreson al tiu lando, en urbon poste difinotan.

S-ro Chavet, dankinte la invitintojn en la nomo de la Organiza Komitato, rekomendis, ke oni havu du Kongresojn ĉiujare. Ĉar la sento de la kongresanoj montris sin favora al tio, ni sendube havos, en la venonta jaro, du Kongresojn, kredeble en la du sezonoj printempo kaj aŭtuno, unu en Ameriko (eble Chautauqua) kaj la alia en Hispanujo (verŝajne en Barcelono.) Oni ankaŭ rekomendis, ke en 1910 la Kongreso okazu en Antverpeno, kaj Japanujo invitis la Kongreson kunveni en 1912 en Tokio, kie en tiu jaro okazos granda Nacia Ekspozicio.

Nun D-ro Mybs, entuziasme aplaŭdata, leviĝas por diri sian ferman paroladon kiel prezidanto, kaj per varmaj vortoj admonas ĉiujn samideanojn, ke ili ĉiam sekvu la flagon en fidela honesteco.

Fine, D-ro Zamenhof, en mallonga parolado, esprimis sian koran dankon al la Kvaro, al la urbo Dresdeno, kaj al la Germana Esperantista Societo pro la fervoreco kaj gastameco kun kiuj ili kunklopodis al la brilega sukcesigo de tiu ĉi kvara festo de nia fratiĝo.

La Specialistaj Kunvenoj

Ne malpli gravaj ol la agadaj kunsidoj estis la diversaj specialistaj kunsidoj. Ĉiujare ilia nombro kaj praktikeco pligrandiĝas, kaj ĉiujare la aranĝo de la horoj de tiuj kunsidoj tiamaniere, ke ili ne reciproke interkonfliktu, trudas al la organizantoj de niaj Kongresoj laboron tute ne facilan, kaj preskaŭ neeble estas, kontentigi ĉiujn kunvenemulojn. Sed malgraŭ kelkaj neevitebla neoportunajoj, prosperis al la diversaj specialistoj organizi multajn tre sukcesajn fakajn kunvenojn, multaj el kiuj estas sendube la ĝermoj de movadoj, kiuj nepre iam akiros tutmondan utilecon kaj gravecon.

Okazis tiun ĉi jaron pli ol 20 tiaj specialistaj kunsidoj. Kunvenis la Scienca Asocio, la Teologoj kaj Tradukantoj de la Biblio, Anti-alkoholuloj, Liberpensuloj, Ruĝkrucanoj, Katolikoj, Policanoj, Kolektistoj kaj Interŝanĝistoj, la Jurnalistoj, Socialistoj, Komercistoj, Stenografiistoj, Internacia Asocio de Studentoj, Vegetaranoj, Muzikistoj kaj Tradukantoj de Naciaj Kantoj, Ŝakludistoj, Teosofiistoj, Instruistoj, Framasonoj, k.t.p.

La Koncertoj

Oni vidis, ke ja sufiĉe granda parto de la Kongresa tempo estas dediĉita al laboro. Sed kvankam tiel laborema, la Esperantistaro ankaŭ bone scias sin amuzi, kaj en la Kvara Kongreso, dank' al la lerta organizado de la Kvaro, tute ne mankis rimedoj por sin distri. La diversaj koncertoj, en kiuj niaj kongresanoj havis la privilegion aŭdi bonegajn profesiajn kantistojn kaj kantistinojn, brile sukcesis, kaj tre rimarkinde estis la facileco kaj boneco de la elparolado de tiuj novaj Esperantistoj. Ankaŭ tre plaĉis la instrumenta interpretado de la orkestro de la 2a Reĝa Regimento de Grenadiroj, sub la lerta direktado de S-ro Schröder.

Meissen

Krom la koncertoj kaj ludoj, estis ankaŭ tre belaj ekskursoj. Mardon posttagmezon la tuta kongresanaro forveturis al la historie fama urbo Meissen, en tri specialaj flagornamitaj vaporŝipoj kompleze alpruntitaj senpage de la urbo. Salvopafoj salutis ilian alvenon ĉe la kajo en Meissen, la urba orkestro, en la konvencia kostumo de cilindra ĉapelo kaj nigra frako, ludis "La Espero," kaj baldaŭ la ĝojanta kompanio, antaŭirate de kornojn ludantaj heroldoj antikve vestitaj, serpente marŝis supren tra la mallarĝaj, pitoreskaj stratoj ĝis la ĉefa placo. Tie la urbestro kore bonvenigis la vizitantojn, kaj tiam denove la karavano ekiris kun bruo kaj herolda muziko al la fama antikva kastelo, fiera kaj imponanta sur sia alta rokego. Dum parto de la gastoj esploris la bele freskitajn ĉambrojn de la kastelo, aliaj iris al la fama porcelanfabrikejo, kiun ja multaj veturinte per fervojo estis vizitintaj jam en la mateno.

Post la vizito al la kastelo, okazis koncerto en la katedralo. Manĝinte en la restoracio sur la teraso, kie la kompatinda Majstro ree estis kaptita de la fotografisto, oni iris malsupren ĝis la Geipelburg, koncerthalo populara apud la bordo de la Elbe. Tie okazis plua koncerto, kun prezentado de komedio de Kotzebue, *La Malfeliĉulo*, ludata de deknacia aktoraro. Fine, proksime je noktomezo, oni procesie iris, gvidataj de torĉportantoj kaj muzikistaro, al la stacidomo, longa marŝado subite haltigita sur la ponto super la Elbe de la belega iluminado de la kastelo "Albrechtsburg" kaj de la porcelana fabrikejo. En miranta silento oni rigardadis la graciajn profilojn de l' katedralo kaj kastelo elstarantaj ruĝe

Digitized by Google

kiel flamantaj kontraŭ la profunda mallumo de la ĉielo, dum la tonoj de korno dolĉe sonadis—bela spektaklo, konvena klimakso de tre agrabla kaj memorinda tago.

Saksa Svisujo

La alia ekskurso oficiala estis al la tiel nomita "Saksa Svisujo," Mirinde bela regiono ĝi estis, kaj ĉiu partoprenanto, malgrau la varmeco, plene ĝuis la grimpadon supren al la Bastei, lau vojo trairanta alte super kapturnigaj profundajoj tra la stranga sed tre plaĉanta rok-pejzaĝo. Kun akrigita apetito oni kune manĝis en la granda restoracio sur la Bastei, kaj poste amike babilantaj grupetoj malsupreniris tra ĉarma regiono al Wehlen. Tie la urbestro, parolante en Esperanto, esprimis sian ĝojon vidi en Wehlen tiom da nacioj samideane kunvenintaj. Fruvespere la plej agemaj el la geesperantistoj fervore dancis sur la placo, kaj je la oka la muzikistaro de Wehlen, akompanate de portantoj de lampionoj, kondukis la festantaron ree al la ŝipoj. La vojaĝo Dresdenon estis gajigata de iluminado de la domoj kaj kasteloj sur la bordoj de la rivero. Ĝiuflanke audiĝas la bruo de eksplodantaj raketoj, kaj preskau sencese disvastiĝas la heliga brilo de la ruĝaj fajroj. Tiel dauradis ĝis la ŝiparo atingis Dresdenon, kie la oficialaj konstruajoj de la registaro kaj urbo partoprenis en la iluminado; kaj jen unu plua bela tago kun bedauro finita!...

Ĝis la Revido!...

Nu, la Kongreso finiĝis. Kio estas la resuma impreso, kiun ĝi lasas al ni? Lau mia opinio ĝi lasas al ni impreson de la sencesa antauenirado de jam ne plu haltigebla movado, impreson de iu granda forto kiu logas al kunhelpo ĉiujn partojn de la mondo. La unua Kongreso estis kvazau intima festeto, en kiu ĉiu ja povis koni ĉiun alian. Nun nia familia rondo tiel vastiĝis, ke neeble estas, konatiĝi kaj rilati kun ĉiuj kongresanoj. Sed malgrau tio, nia rondo restas ankorau kaj ĉiam restos, *familia* rondo, kies anoj ĉiam sentos sin spirite kaj kore kunligataj de la altaj idealoj de la Esperantismo. Tiu estas unu impreso, kiun lasas al mi la Kongreso. La alia plej rimarkinda punkto estis la unuanimeco kaj solidareco, kun kiu la kongresanoj aprobis ĉiun eĉ malgrandan aludon al nia devo resti lojale kaj ageme fidelaj al la "Fundamento," kaj en tiu saĝa firmeco estas la certo, ke nia lingvo, per la kuraĝa kaj prudenta kunlaborado de ĉiuj Esperantistoj, nepre iun tagon, ne tre malproksiman, atingos en gloro la plenan kaj grandiozan triumfon.—W. Mann.

RAPORTO DE D-ro K. BEIN

Pri la fondo de la Esperantista Akademio kaj pri la Laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum la Kvara Kongreso, legita de li en la lasta agada kunsido de la Kongreso, Aŭgusto 22, 1908.

Esperantistoj,—Mi havas la honoron prezenti al vi raporton pri la fondo de la Esperantista Akademio kaj pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum la Dresdena Kongreso.

Por forigi la malutilojn de la grandnombreco de la Lingva Komitato, la prezidanto prezentis al la Lingvaj Komitatanoj projekton de reorganizo de la Komitato,—ĝian dupartigon, formante en ĝi Konstantan Superan Komision au Akademion el 18 membroj. Lau tiu ĉi projekto, ĉiuj komitatanoj havas egalan rajton elekti novajn membrojn, baloti membrojn de la Akademio, esti balotataj en ĝin, proponi demandojn kaj diskuti la proponitajn temojn, sed nur la Akademio decidos, kun tiu rezervo tamen, ke la plena Lingva Komitato povas ĉiam postuli duan pridiskuton kaj en tia okazo eldiri la finan decidon.

Kiam la provizora regularo de la nova projekto estis akceptita de la Lingva Komitato (per 66 voĉoj el la 80 voĉdonintoj), la prezidanto, konforme al la 8a artikolo de la regularo, dissendis al la Lingva Komitatanoj liston de 26 kandidatoj en la Akademion, proponante dume elekti nur 12 membrojn. La rezultato de la baloto estis jena: per absoluta plimulto estis elektitaj nur 9 Akademianoj, kies nomoj estas: Boirac, Bein, Cart, Grabowski, Moch, Saussure, Nylen, Mybs, Villanueva, t.e., 4 franclingvanoj, 2 Poloj, 1 Svedo, 1 Germano kaj 1 Hispano.

La unua tasko de la Akademianoj, kunvenintaj en Dresdeno antau la Kongreso, estis elekti sian estraron. Oni decidis pli-

Digitized by Google

jam kolektis grandan sumon da mono por tiu celo, kaj li promesis la koran kunhelpadon de la *North American Review* por la sukcesigo de la afero.

Montrante tiel la vetfervoremon, kiu nun ekzistas por gastigi nian anaron, tuj post li stariĝis S-ro Pujulá y Vallés (Kataluno) kaj Kapitano Perigordo (Hispano), kiu en vera Esperantisma unueco, je la nomo de la du Hispanujaj societoj, invitis la Kvinan Kongreson al tiu lando, en urbon poste difinotan.

S-ro Chavet, dankinte la invitintojn en la nomo de la Organiza Komitato, rekomendis, ke oni havu du Kongresojn ĉiujare. Ĉar la sento de la kongresanoj montris sin favora al tio, ni sendube havos, en la venonta jaro, du Kongresojn, kredeble en la du sezonoj printempo kaj aŭtuno, unu en Ameriko (eble Chautauqua) kaj la alia en Hispanujo (verŝajne en Barcelono.) Oni ankaŭ rekomendis, ke en 1910 la Kongreso okazu en Antverpeno, kaj Japanujo invitis la Kongreson kunveni en 1912 en Tokio, kie en tiu jaro okazos granda Nacia Ekspozicio.

Nun D-ro Mybs, entuziasme aplaudata, leviĝas por diri sian ferman paroladon kiel prezidanto, kaj per varmaj vortoj admonas ĉiujn samideanojn, ke ili ĉiam sekvu la flagon en fidela honesteco.

Fine, D-ro Zamenhof, en mallonga parolado, esprimis sian koran dankon al la Kvaro, al la urbo Dresdeno, kaj al la Germana Esperantista Societo pro la fervoreco kaj gastameco kun kiuj ili kunklopodis al la brilega sukcesigo de tiu ĉi kvara festo de nia fratiĝo.

La Specialistaj Kunvenoj

Ne malpli gravaj ol la agadaj kunsidoj estis la diversaj specialistaj kunsidoj. Ĉiujare ilia nombro kaj praktikeco pligrandiĝas, kaj ĉiujare la aranĝo de la horoj de tiuj kunsidoj tiamaniere, ke ili ne reciproke interkonfliktu, trudas al la organizantoj de niaj Kongresoj laboron tute ne facilan, kaj preskaŭ neeble estas, kontentigi ĉiujn kunvenemulojn. Sed malgrau kelkaj neevitebla j neoportunajoj, prosperis al la diversaj specialistoj organizi multajn tre sukcesajn fakajn kunvenojn, multaj el kiuj estas sendube la ĝermoj de movadoj, kiuj nepre iam akiros tutmondan utilecon kaj gravecon.

Okazis tiun ĉi jaron pli ol 20 tiaj specialistaj kunsidoj. Kunvenis la Scienca Asocio, la Teologoj kaj Tradukantoj de la Biblio, Anti-alkoholuloj, Liberpensuloj, Ruĝkrucanoj, Katolikoj, Policanoj, Kolektistoj kaj Interŝanĝistoj, la Jurnalistoj, Socialistoj, Komercistoj, Stenografiistoj, Internacia Asocio de Studentoj, Vegetaranoj, Muzikistoj kaj Tradukantoj de Naciaj Kantoj, Ŝakludistoj, Teosofiistoj, Instruistoj, Framasonoj, k.t.p.

La Koncertoj

Oni vidis, ke ja sufiĉe granda parto de la Kongresa tempo estas dediĉita al laboro. Sed kvankam tiel laborema, la Esperantistaro ankaŭ bone scias sin amuzi, kaj en la Kvara Kongreso, dank' al la lerta organizado de la Kvaro, tute ne mankis rimedoj por sin distri. La diversaj koncertoj, en kiuj niaj kongresanoj havis la privilegion aŭdi bonegajn profesiajn kantistojn kaj kantistinojn, brile sukcesis, kaj tre rimarkinde estis la facileco kaj boneco de la elparolado de tiuj novaj Esperantistoj. Ankaŭ tre plaĉis la instrumenta interpretado de la orkestro de la 2a Reĝa Regimento de Grenadiroj, sub la lerta direktado de S-ro Schröder.

Meissen

Krom la koncertoj kaj ludoj, estis ankaŭ tre belaj ekskursoj. Mardon posttagmezon la tuta kongresanaro forveturis al la historie fama urbo Meissen, en tri specialaj flagornamitaj vaporŝipoj kompleze alpruntitaj senpage de la urbo. Salvopafoj salutis ilian alvenon ĉe la kajo en Meissen, la urba orkestro, en la konvencia kostumo de cilindra ĉapelo kaj nigra frako, ludis "La Espero," kaj baldaŭ la ĝojanta kompanio, antaŭirate de kornojn ludantaj heroldoj antikve vestitaj, serpente marŝis supren tra la mallarĝaj, pitoreskaj stratoj ĝis la ĉefa placo. Tie la urbestro kore bonvenigis la vizitantojn, kaj tiam denove la karavano ekiris kun bruo kaj herolda muziko al la fama antikva kastelo, fiera kaj imponanta sur sia alta rokego. Dum parto de la gastoj esploris la bele freskitajn ĉambrojn de la kastelo, aliaj iris al la fama porcelanfabrikejo, kiun ja multaj veturinte per fervojo estis vizitintaj jam en la mateno.

Post la vizito al la kastelo, okazis koncerto en la katedralo. Manĝinte en la restoracio sur la teraso, kie la kompatinda Majstro ree estis kaptita de la fotografisto, oni iris malsupren ĝis la Geipelburg, koncerthalo populara apud la bordo de la Elbe. Tie okazis plua koncerto, kun prezentado de komedio de Kotzebue, *La Maljeliĉulo*, ludata de deknacia aktoraro. Fine, proksime je noktomezo, oni procesie iris, gvidataj de torĉportantoj kaj muzikistaro, al la stacidomo, longa marŝado subite haltigita sur la ponto super la Elbe de la belega iluminado de la kastelo "Albrechtsburg" kaj de la porcelana fabrikejo. En miranta silento oni rigardadis la graciajn profilojn de l' katedralo kaj kastelo elstarantaj ruĝe

Digitized by Google

kiel flamantaj kontraŭ la profunda mallumo de la ĉielo, dum la tonoj de korno dolĉe sonadis—bela spektaklo, konvena klimakso de tre agrabla kaj memorinda tago.

Saksa Svisujo

La alia ekskurso oficiala estis al la tiel nomita "Saksa Svisujo," Mirinde bela regiono ĝi estis, kaj ĉiu partoprenanto, malgrau la varmeco, plene ĝuis la grimpadon supren al la Bastei, lau vojo trairanta alte super kapturnigaj profundajoj tra la stranga sed tre plaĉanta rok-pejzaĝo. Kun akrigita apetito oni kune manĝis en la granda restoracio sur la Bastei, kaj poste amike babilantaj grupetoj malsupreniris tra ĉarma regiono al Wehlen. Tie la urbestro, parolante en Esperanto, esprimis sian ĝojon vidi en Wehlen tiom da nacioj samideane kunvenintaj. Fruvespere la plej agemaj el la geesperantistoj fervore dancis sur la placo, kaj je la oka la muzikistaro de Wehlen, akompanate de portantoj de lampionoj, kondukis la festantaron ree al la ŝipoj. La vojaĝo Dresdenon estis gajigata de iluminado de la domoj kaj kasteloj sur la bordoj de la rivero. Ĝiuflanke audiĝas la bruo de eksplodantaj raketoj, kaj preskau sencese disvastiĝas la heliga brilo de la ruĝaj fajroj. Tiel dauradis ĝis la ŝiparo atingis Dresdenon, kie la oficialaj konstruajoj de la registaro kaj urbo partoprenis en la iluminado; kaj jen unu plua bela tago kun bedauro finita!...

Ĝis la Revido!...

Nu, la Kongreso finiĝis. Kio estas la resuma impreso, kiun ĝi lasas al ni? Lau mia opinio ĝi lasas al ni impreson de la sencesa antauenirado de jam ne plu haltigebla movado, impreson de iu granda forto kiu logas al kunhelpo ĉiujn partojn de la mondo. La unua Kongreso estis kvazau intima festeto, en kiu ĉiu ja povis koni ĉiun alian. Nun nia familia rondo tiel vastiĝis, ke neeble estas, konatiĝi kaj rilati kun ĉiuj kongresanoj. Sed malgrau tio, nia rondo restas ankorau kaj ĉiam restos, *familia* rondo, kies anoj ĉiam sentos sin spirite kaj kore kunligataj de la altaj idealoj de la Esperantismo. Tiu estas unu impreso, kiun lasas al mi la Kongreso. La alia plej rimarkinda punkto estis la unuanimeco kaj solidareco, kun kiu la kongresanoj aprobis ĉiun eĉ malgrandan aludon al nia devo resti lojale kaj ageme fidelaj al la "Fundamento," kaj en tiu saĝa firmeco estas la certo, ke nia lingvo, per la kuraĝa kaj prudenta kunlaborado de ĉiuj Esperantistoj, nepre iun tagon, ne tre malproksiman, atingos en gloro la plenan kaj grandiozan triumfon.—W. Mann.

RAPORTO DE D-ro K. BEIN

Pri la fondo de la Esperantista Akademio kaj pri la Laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum la Kvara Kongreso, legita de li en la lasta agada kunsido de la Kongreso, Aŭgusto 22, 1908.

Esperantistoj,—Mi havas la honoron prezenti al vi raporton pri la fondo de la Esperantista Akademio kaj pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum la Dresdena Kongreso.

Por forigi la malutilojn de la grandnombreco de la Lingva Komitato, la prezidanto prezentis al la Lingvaj Komitatanoj projekton de reorganizo de la Komitato,—ĝian dupartigon, formante en ĝi Konstantan Superan Komision au Akademion el 18 membroj. Lau tiu ĉi projekto, ĉiuj komitatanoj havas egalan rajton elekti novajn membrojn, baloti membrojn de la Akademio, esti balotataj en ĝin, proponi demandojn kaj diskuti la proponitajn temojn, sed nur la Akademio decidos, kun tiu rezervo tamen, ke la plena Lingva Komitato povas ĉiam postuli duan pridiskuton kaj en tia okazo eldiri la finan decidon.

Kiam la provizora regularo de la nova projekto estis akceptita de la Lingva Komitato (per 66 voĉoj el la 80 voĉdonintoj), la prezidanto, konforme al la 8a artikolo de la regularo, dissendis al la Lingva Komitatanoj liston de 26 kandidatoj en la Akademion, proponante dume elekti nur 12 membrojn. La rezultato de la baloto estis jena: per absoluta plimulto estis elektitaj nur 9 Akademianoj, kies nomoj estas: Boirac, Bein, Cart, Grabowski, Moch, Saussure, Nylen, Mybs, Villanueva, t.e., 4 franclingvanoj, 2 Poloj, 1 Svedo, 1 Germano kaj 1 Hispano.

La unua tasko de la Akademianoj, kunvenintaj en Dresdeno antau la Kongreso, estis elekti sian estraron. Oni decidis pli-

Digitized by Google

grandigi la nombron de la vic-prezidantoj ĝis 3-4 kaj provizore elekti nur parton de la estraro (prezidanton kaj 2 vic-prezidantojn), prokrastante la elekton de la ĝenerala sekretario kaj de 1-2 pluaj vic-prezidantoj ĝis la tempo, kiam la Akademio estos plennombra. Estis elektitaj: Rektoro Boirac, prezidanto; D-ro Bein kaj D-ro Mybs, vic-prezidantoj.

Jen la ĉefaj rezultatoj de la laboroj de l' Akademio kaj de la Lingva Komitato dum la Kvara Kongreso:—

1. Estis fonditaj 4 konstantaj komisioj aŭ sekcioj. (*a*) por la gramatiko, (*b*) por la komuna vortaro, (*c*) por la teknika vortaro, kaj (*d*) por la internaj kaj ĉiuj aliaj aferoj. Kiel direktoroj de la 4 sekcioj estis elektitaj: (*a*) S-ro Grabowski, *gramatiko;* (*b*) Prof. Cart, *komuna vortaro;* (*c*) Prof. Saussure, *teknika vortaro;* (*d*) S-ro Moch, *internaj aferoj.*

2. Estis redaktita de la Akademio kaj aprobita de la Lingva Komitato la deklaro pri la rolo de la Lingva Komitato. Jen ĝia teksto: "La tasko de la Lingva Komitato estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin lau la supreditaj principoj. Neniel la Fundamento, nek la Lingva Komitato povas esti baro por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili, kontraue, certigas. Dank' al la fondo de la Akademio, la Lingva Komitato, nun praktike reorganizita, publikigos antaŭ la fino de la jaro, kiel oficialan aldonon de la 'Universala Vortaro,' la rezultaton de la jam faritaj laboroj; poste aperos studoj pri la teknika vortaro kaj pri la sintakso. Trankvile kaj firme, lau la konsilo de nia Majstro, Esperantistoj, ni povas iri nian vojon."

3. Estis preparita listo de kandidatoj en la Lingva Komitato. Tiu listo ne estas ankorau definitiva, kaj ĉiuj esperantistaj societoj, grupoj kaj eĉ izolitaj Esperantistoj havas la rajton kaj estas petataj sendi la nomojn de siaj kandidatoj al la estraro de la Akademio.

4. La Akademio kaj la Lingvaj Komitato akceptis la proponon de D-ro Mybs pri averto, dissendota al la kandidatoj en la Lingvan Komitaton. Jen ĝia teksto: "Oni memorigas, ke elektante iun membro de la Lingva Komitato, oni intencas postuli de li efektivan laboradon, kiam estos necese, kaj ne doni nur al li honoran titolon. Oni insiste petas, ke la Lingva Komitatanoj neniam uzu tiun titolon por reklama celo, ĉar tia malbonuzo povus tre malutili la autoritaton de la Lingva Komitato."

5. Estis akceptita de la Lingva Komitato la propono de la prezidanto fondi specialan kason de la Lingva Komitato.

Esperantistoj! Nia forteco, kiel diris la Majstro, ne estas la merito de iu el ni aparte, sed ĝi estas nur la rezultato de multjara pacienca laborado de multo da personoj. Ne dubante, ke tiu ĉi multo—la tuta Esperantistaro—helpados la Lingvan Komitaton, ni kun plena espero rigardas la estontecon, ĉiam instigataj al la laboro per la flama deziro plej baldaŭ vidi la definitivan triumfon de Esperanto.

Esperanto and the Red Cross

"Vocho de Kuracisto"

La "Societe Francaise Esperanto Croix-Rouge" aranĝis dum la kongreso du kunsidojn, en kiuj estis elektitaj, kiel prezidantoj, generaloj Sébert (Francujo) kaj Schmidt (Germanujo). La sekretario, Leutenanto Bayol tralegis la sekvantajn proponojn, kiuj estis akceptitaj:

I. Ĉiulande krei naciajn societojn Esperanto-Ruĝa-Krucajn por trafi trioblan celon.

1) prepari kaj certigi la interkompreniĝon en la ambulancoj kaj milithospitaloj;

2) disvastigi Esperanton en la militistaroj, maristaroj kaj inter la personoj, kiuj milittempe kuracos kaj flegos vunditojn, malsanulojn kaj militkaptitojn;

3) varbi en Esperantistaro por la Societoj de Ruĝa-Kruco kiel eble plej multe da anoj.

La regularo de la "Societe francaise Esperanto-Croix-Rouge" povus estis utila je la organizontoj de similaj Societoj.

II. Elekto de internacia insigno Esperanto-Ruĝkruca. (Sur blanka blazonkampo ruĝa kruco kaj en la centro de ĝi stelo esperantista).

III. Kutima uzado de Esperanto, kiel helpa lingvo, dua lingvo, en la Ruĝkrucejoj, por ke estu redaktitaj dulingve la formuloj, receptoj, ordonoj, surskribetoj, k.t.p.

Ekzemple—la franca Ruĝkrucejo:
Ambulance—Ambulanco.
Cuisine—Kuirejo.

Cabinet du médecin-chef—Ĉambro de la kuracistestro—k.t.p.

IV. Estus dezirinde, ke tre ofte la geruĝkrucistoj korespondu kun diversnaciaj kolegoj.

Digitized by Google

Ekzeple: Sinjorino, apartenanta al unu el tri Societoj de la franca Ruĝa-Kruco (Société de secours aux blessés en temps de guerre—Association des Dames Francaises—Union des Femmes de France) skribus kelkafoje al Sinjorino de la Japana Ruĝa-Kruco, por sciigi ŝin pri la progresoj de sia Societo—kaj reciproke.

Ne ekzistas regnaj sekretoj en tio, kio koncernas la helpon al la militvunditoj. Samtempe la institucio de Ruĝa-Kruco estas nacia kaj internacia. Ĉu ĝia celo ne estas la plibonigo de la suferanta homaro?

V. Deve paroli Esperanton lau la Zamenhofa "Fundamento."

VI. Firmo Hachette (79 Boulevard Saint Germain, Parizo) estas daurigonta la publikigon ĉiulingvan de la "Gvidlibreto Esperanto-Ruĝkruca." Tiu broŝureto, jam presita france, germane, kaj itale, baldau aperos: hispane (tradukinto Kapitano Duyos), Svede (tradukinto Militintendanto Max Schurer von Waldheim), bulgare (tradukinto Leutenanto Popon), ruse (tradukinto S-ro Kolovrat), dane (tradukintino F-ino Mönster).

Firmo Hachette posedas la manuskriptojn de tiuj tradukoj.

Estus dezirinde, ke aliaj tradukontoj (japana, angla, portugala, araba, k.t.p.) bonvolu preni sur sin la tradukon de tiu libreto kaj ĝin sendi al Firmo Hachette kiel eble plej frue.

Plie tiuj broŝuretoj estu disdonataj kiel eble plej frue kaj ĉie.

Tiel la nacioj estus pretaj, kiam popoloj estos batalontaj.

VII. Organizi kiel eble plej multe da paroladoj—kursoj pri Esperanto en kazernoj, sur la militŝipoj en oficirejoj, en militlernejoj, en Ruĝkrucejoj, k.t.p.

VIII. Estus dezirinde, ke interkonsento inter la staboj ĉiuarmeaj efektivigu la jenon, almenau kiel provon:

La grupo de fremdaj oficiroj, ĉeestantaj la manovrojn jarajn de ia nacio, konsistu el esperantistaj oficiroj (se eble ne parolantaj la lingvon de la manovra lando).

Servsoldato, parolanta esperante, estus je la dispono de ĉiu kaj ordonportistoj komunikus esperante al ili la sciigojn pri la taktikaj situacioj, la militagadoj intersekvaj, k.t.p. Generalo PRIOU.

Post la kunsido la Ruĝ-Kruca Unuiĝo de Saksujo invitis ĉiujn esperantistojn al praktikaj esperantaj ekzercadoj de la Ruĝkrucanoj en Dresden.

Ĉeestis inter aliaj D-ro L. L. Zamenhof, Generalo Sébert, Leutenanto Bayol, la filo de la kreinto de Ruĝa-Kruco S-ro Meunnier. La ekzercadojn kondukis D-ro Thalwitzer. kiu esperante salutis ĉiujn alvenintojn kaj klarigis la detalojn.

La ekzercadoj pruvis, ke la taĉmento, konsistanta el du kolonoj de ruĝkrucanoj sub la direktado de la botisto S-ro Hahn, kaj la librovendisto S-ro Trinks, tre bone kaj flue parolis esperante, malgrau la relative mallonga lernado. Post lauta kaj energia komando en Esperanto la taĉmento komencis la ekzercadojn. Kvar vunditoj estis levitaj kaj metitaj sur portilojn. Unu ricevis vundon je la kruro, la dua je la kapo, la tria estis trafita per kuglo en la ventron kaj al la kvara oni faris artan spiradon. D-ro Thalwitzer ordonis klarigi pri la speco de la vundoj kaj de la necesaj en tiu ĉi okazo bandaĝoj. La demanditoj donis klaran kaj mallongan respondon esperante.

Poste oni demandis unu malsanulon pri la stato de lia farto kaj preparis por li la liton. La instruado de la kolonoj en Esperanto dauris lau klarigoj de S-ro Thalwitzer 20 horojn (dek lecionojn). La instruistoj estis S-ro Elb (la teoria parto) kaj D-ro Thalwitzer (praktika parto). Post la ekzercadoj la Generalo Schmidt dankis ĉiujn pro ilia alveno kaj finis sian paroladon per aklamo: Vivu D-ro Zamenhof!

D-RO KRUKOVSKI.

De D-ro Thalwitzer ni recevis la sekvantan alvokon:

Dum la Dresdena Kongreso, la 19-an de Augusto, fariĝis grava praktika paŝo antaŭen. Sanista roto ("Sanitätskolonne") unuafoje ekzercadis antau la Majstro D-ro Zamenhof, la kongresanoj kaj aliaj, parte plej dubemaj ruĝkrucanoj, tute en Esperanto. Neniu germana vorto, nur Esperanto!

Kaj la provo feliĉe sukcesis. La sanistoj komprenis ĉion, kion la ordonanta kuracisto ordonis al ili. La samaj sanistoj estis ricevintaj instruadon de nur 10 vesperoj po nur 2 horoj en nur 5 semajnoj! Ili antaŭe nenion sciis pri Esperanto kaj ne estas lingvaj instruituloj; male ili estas simplaj metiistoj en pli alta aĝo, kiuj eĉ estas forgesintaj ĉiujn lernejajn sciojn.

Eĉ tre dubantaj ne-esperantistoj devis tie ĉi konfesi, ke nia esperanta-ruĝkruca parado estis sukcesplena. Ĝi estas aranĝita, lau iniciato de la subskribinto, oficiale de la direkcio de la saksland ruĝkruca unuiĝo, kiel unua kuraĝa provo.

En du specialaj kunsidoj dum la kongreso oni paroladis pri la enkonduko de Esperanto en la praktikan ruĝkrucan laboradon. Oni decidis, ke oni fondos—lau ekzemplo de la "Société francaise pour la propagation de Esperanto dans la Croix-Rouge"—ĉie naciajn societojn, kiuj aligitaj al la esperan-

Digitized by Google

tistaj societoj, propagandus la diritan celon, t. e. esperantistan propagandon ĉe la ruĝkrucanoj kaj la ruĝkrucan propagandon ĉe la esperantistaro.

En la dua speciala kunsido oni elektis kiel Trion por la proksima kongreso S-on Leutenanton Bayol (Beauvais, Oise, Francujo) S-inon Mönster (Kopenhago, Danujo) kaj D-ron Thalwitzer (Kötzsĉenbroda-Dresden, Germanujo). La tasko de tiu ĉi Trio estos: prepari nian aferon por la proksima kongreso kaj kolekti ĉiujn el la tuta mondo sciigojn pri la demando "Esperanto kaj Ruĝa Kruco." poste interŝanĝi tiujn sciigojn kaj interkonsenti pri la maniero de la ebla internacia propagandado.

Kiel unika kuracisto inter la Trio mi petas la kolegojn, ke ili bonvolu labori en nia nova bela afero kaj ĉie fondi naciajn interesgrupojn, eble en la komenco kiel partojn de jam estantaj esperantistaj grupoj.

Mi petas kolegojn bonvoli sciigi min pri ĉiuj paŝos tielaj. Mi petas, kolegoj, ke vi legu la broŝureton de Bayol: "Esperanto et Croix-Rouge" Paris Machette et K-o au la germanan tradukon de L. Elb "Esperanto und das Rote Kreuz" Berlin w. 15 Esperanto-Verlag Hans Th. Hoffmann M. l. 30.

Mi fine dezirus atentigi la kolegojn, ke la generalkuracisto D-ro Ruhlemann kaj mi mem ellaboris "instruilon por sanistoj kaj portistoj" tute en Esperanto, en kiu libro, baldau aperonta, la kvardekjara sperto de generalkuracisto Ruhlemann estas uzota por proponoj pri la internacia, eble samforma, instruado.

AÉRO-CLUB DE FRANCE

Paris, 30an de Augusto, 1908.

Red. FILIPINA ESPERANTISTO

Kara Samideano:

Vi eble audis pri la energiaj penoj, kiujn mi, kaj kelkaj el miaj samlandanoj faras por la disvastigo kaj perfektigo de la bela scienco Aerirada.

Mi ĉiam pensis ke Esperanto kaj Aerirado devas esti tute frataj sciencoj, kiuj certe helpos reciproke por sia monda disvastiĝo. Mi do havis la ideon fari, per ĉiuj esperantistaj jurnaloj en la mondo, grandan enketon pri la ĉiea progresado de la aerflugada scienco.

Mi do multe dezirus, ke via jurnalo publikigu zorgan enketon pri la stato de la Aerflugado en via lando, kaj la nomoj de la scienculoj laborantaj pri ĝi, kaj poŝte sendu al mi la publikajon pri tio.

Eble tiuj ĉi povus skribi artikolojn donantajn ian ĝeneralan vidpunkton pri la Aerflugado, kaj eĉ siajn proprajn ideojn pri ĝi.

Plej interese estus se vi havus iun, aerflugiston samtempe esperantiston, kiu skribus tuj, esperante, artikolon pri la afero.

Mi intencas kunvoki en Franclando, kun la helpo de la Franca Aero Klubo, grandan internacian Kongreson de flugmaŝinistoj, kaj mi tre dezirus havi respondon de viaj samlandoj, por sciigi min, ĉu multaj el ili eble venos al tiu Kongreso, aŭ interesiĝos pri ĝi.

Mi ĉiuokaze estos feliĉega, se kelkaj el ili volus senpere korespondi en Esperanto kun mi pri tiu temo. Tio ebligos al mi samtempe interŝanĝi interesan esperantan korespondadon, kaj ankau juĝi dokumente la ĉiulandan aerflugadan progresadon.

Mi petas ke oni sendu la respondojn ĉe mia persona adreso, 77 rue de Prony, Paris.

Dankante vin antaue pri la helpo kiun vi donos al mi, mi petas vin akcepti, kara samideano, mian koran saluton.

ERNEST ARCHDEACON
Prezidanto de la Komisiitaro
pri Aerflugado de la Franca Aéro-Klubo.

KORESPONDADO

G. WERNICKE, komercinstruisto, Bremen, Ansgaritorstr. 22, Germanujo, deziras korespondadi kaj interŝange postmarkojn.

---

*Deziras korespondadi postcarte:—

*S-ro Nikolas Mihajlov, Vozdvyenskaja ul 4, St. Peterburg, Russia.
*S-ro Egberto Méndez, Plazuela de S. Juan 1, Mondoñedo, Lugo, Spain.
*S-ro R. V. Idoyaga, Victoria 61, Montevideo, Uruguay.
*S-ro Otto Engel, Oberstein, Germany.
*H. Wuttke, Pionierstrasse 21, Magdeburg, Germany.

The following publications have been received and will be reviewed in our next issue.

ESPERANTO FOR THE ENGLISH—by A Franks (Milner & Co., Paternoster Row, London) paper 6d. (25 Sm.)

FRAULINO JULIE, naturalista tragedio por August Strindberg tradukis el Sveda lingvo por Paul Nylen kaj S. E. Krikortz.

PARIO by same author—both from "Esperantisten" 137 Surbrunnsgatan, Stockholm.

KOPENHAGO, ilustrita gvidlibro.

JARLIBRO DE ITALAJ ESPERANTISTOJ, 1908.

QUIERE V. APRENDER ESPERANTO?, manual de la conversación Esperanta, por el Dr. D. J. Bremón Musgrau, (F. Granada y Ca., 344, Diputación, Barcelona, Hispanujo.)

PRAHA, ILUSTRITA GVIDLIBRO POR TURISTOJ.

Digitized by Google

SERMON BY DR. KÜHN

preached in Esperanto in the Lutheran Church "Kreuzkirche"

Dresden, August 16, 1908

Danku al Dio, ĉar Li estas afabla kaj Lia Boneco dauras eterne. Amen.

Aŭdu, karaj gefratoj kaj geamikoj, piege du vortojn de la sankta biblio, por sanktigi la grandan feston de nia kvara esperantista kongreso.

Ne legas la unuan vorton en evangelio lau Matthaeo en la dua ĉapitro deka verso: "Vidante la stelon, ili fariĝis tre ĝojigitaj" kaj la alian vorton en la letero al la Romanoj en la dekdua ĉapitro dekdua verso:

"Estu gajaj en espero." Amen.

Kiel belege sonoras, kiel kaptas nian koron tiuj ĉi vortoj: "Ili fariĝis tre ĝojigitaj."

Tre ĝojiĝitaj! Tio estu nia saluto kaj atesto kaj signalvorto.

Tre ĝojigitaj, ĉar ni vidis la stelon, la stelon de granda espero.

Ĉiam bona Dio, ekbriligu al ni Vian eternan lumon. Amen.

Thomas Carlyle, tiu glora brita pensulo, promenis iam kun amiko en silenta koro sub la luma brilego de la nokta stela ĉielo. La amiko diris ravate: "Kia belega aspekto!" Sed Carlyle reparolis enpensiĝa: "Kiel terura!" La stela ĉielo terura? Kial? Carlyle sciis: ĝi estas tiel altega—kaj ni ofte malaltaj; ĝi estas tiel hela—kaj ni ofte malhelaj; ĝi ĉiam havas ĝustajn vojojn—kaj ni ofte malĝustajn.—Tion ĉi sentis Thomas Carlyle kaj tial li elvokis: kiel terura!

Tamen en la profundeco efektive ankau lia animo estis tre ĝojigita kaj dankema pri la potenca kaj movanta predikado, kiun la ĉiopova faras per la oraj kandeloj en la blua ĉieltendo.

Tre ĝojigitaj ĉiam estis la homoj, vidante la stelojn en la firmajo kaj konjektante la stelarmeojn, la stelmarojn, mallaŭte rondirantajn ĉirkau la suno, ĉirkau multaj sunoj, fine ĉirkau granda centra suno, la stelojn malgrandajn, grandajn, grandegulajn, gigantajn, la stelojn proksimajn, malproksimajn, la plej malproksimajn, kies ĉiu havas sian propran lumajon, kies lumo eble bezonas milojn eĉ milionojn da jaroj, por alveni al ni.

Tre ĝojigitaj, vidante la stelojn, ĉi tiujn orajn altarojn, sur kiuj pastroj nevideblaj ekflamigas sanktajn oferflamojn, ĉi tiun oran senditaron de la eterna boneco, ĉi tiun oran sciigon de la senfina amo, ĉi tiujn juvelojn de grandioza brilo, ĉi tiujn fenestrojn, tra kiuj rigardas la ĉiela patro, ĉi tiujn okulojn de Dio, radiantajn tage kaj nokte, brilantajn plej hele en la plej densa malheleco.

Tre ĝojigitaj estis la homoj, vidante la stelojn, kiuj kuras kun dia trankvilo diamantajn stratojn, ĉiam egalajn, ĉiam altajn, en nobla ronda danco, harmonie en la sonoro de la aferoj.

Jen fariĝis kviete la malkvieta homa koro, jen estis forflugintaj la doloroj. Ĉu ne rakontis la meditema malnova legendo, ke ekfluas balzamo plidolĉiganta el la steloj en la vundojn fendiĝantajn? Ĉu ne, en rigardo de la steloj, preĝis la ŝipistoj sur la maro vasta? Ĉu ne kuniĝis la manoj en la kara hejmo? Ĉu ne ŝajnis, kvazau sonorigis sonoriloj per ora tono el la profundajo de la ĉielo, kvazau laudkantis anĝeloj: "Dio, Via boneco estas tiel vasta, kiel vasten iras la nuboj" Ĉu ne la ĉieloj glorlaudas la honoron de la Eternulo? Ĉu ne la vespero, ĉiu vespero estas sankta vespero, kaj la nokto, ĉiu nokto, estas sankta nokto? Ĉu ne do la homa koro devas frapi tre ĝojigite?

Tiamaniere la steloj kunkreskis kun nia animo. Ni estimas la ĉieljuvelojn sanktajn kiel la amon de nia patrino. Kaj ili servas al ni kiel amikoj, kiel simbolo de la plej kara valora posedajo, kiel simbolo de nia sopirado kaj serĉado, kiel simbolo de nia celo. Kaj se ni vidas la celon de nia persona espero, nian stelon, kia ĝojego, kia plezurego, kia feliĉego!

Ĉu ne devas salti homo kiel infano, kies fronto estas kisata de la patrino, tre ĝojigita? Ĉu ne ankau ni mem ĝojegas, ni ĉiuj, kiuj portas la noman fieran kaj honestan "Esperantistoj," ne ĉiuj, kiuj kunvenis en Germanujon, en Saksujon, en nian karan reĝan restadejon Dresdenon el la fino de la mondo? Ĉar ni rigardis fakte nian stelon, nian karan stelon, la verdan stelon, la admirandan stelon, kiu ensorĉas kaj feliĉigas kaj levigas, la stelon de eminentula espero, kiu mallaŭte mistere en ĉi tiu momento flugetas kaj sonetas kiel sur anĝelaj flugiloj tra la sankta, silenta spaco de nia majesta antikva preĝejo.

Al kio la homoj sopiregis dolorplene en luma tago, en malluma nokto, al kio alvokis

Digitized by Google

kaj ekkriis kaj ekĝemis, al kio ili etendis la manojn kaj la brakojn kaj la korojn, pri kiu ili revis en ĉarma sonĝo, pro kio la plej fideluloj sin konsumiĝis, pro kio la plej piuloj kuraĝe iris en la morton, pro kio Jesuo Kristo prenis la dornan kronon, la celo de unu granda tutmonda familio, tiu ĉi majesta celo, estinte ĝis nun tiel malproksima, nun hodiaŭ rapide proksimiĝis.

La esperantistoj ĝin atingis per granda penado sed tre ĝojiĝitaj.

Antaŭ ĉiuj ekkonis la stelon verdan bonega eminenta kuracisto. En la plenumado de sia grava profesio, vizitante la bedaŭrindajn malsanulojn, ĉiutage li estis enrigardanta en la okulstelojn de la homoj kaj li mem en sia propraj fidelaj okuloj havas du agrablajn stelojn, plenajn de amo pura: nia D-ro Zamenhof. Li vidis la stelon, li estis amanta ĝin, li ne povis forgesi ĝin. Li ŝirmis ĝin, li donacis al ĝi sian forton, sian tempon, sian arton, sian havon. Li laboris pro ĝi, treege modeste kaj ekstraordinare malegoiste, multajn jarojn en silento. En silento ja ĉiu grandajo kaj bonajo naskiĝas. La pian kaj fidelan viron apogis kaj helpis Dio. Kaj nia heroldo konsideris tute sian vivon kiel dian servadon kaj oficon. Tial lia animo estis ĉiam tre ĝojigita.

Dekkvar jarojn li pensis kaj kreis sekrete. Sed poste li eliris kun reĝa kuraĝo en la publikecon. Jen al multegaj homoj malfermiĝis la okuloj. Estis kiel miraklo sendita de Dio. Ili vidas la stelon de la fortega espero kaj ili juris kune je la nova kaj juna standardo, kaj klopodis kaj batalis pro ĝi, konstante tre ĝojigitaj.

Nenie ili timis la homojn, kiuj skuis la kapojn; nenie la malvarman indiferentecon, nenie malestimon kaj insultadon kaj mokon kaj antipation, nenie kontraŭdiron kaj kontraŭstaron!

Lerte kaj senlaciĝe ili subigis la malhelpojn, venkis la kontraŭajojn, transsaltis la barojn, forpelis la danĝerojn. Venke ili kuris de loko al loko, de popolo al popolo, de lando al lando, de maro al maro, de bordo al bordo. Ili similis al la saguloj de l'oriento, al la sagŭloj de la sankta historio, kiuj ankaŭ ekkonis sian sanktan stelon kaj ĝin sekvis tra stepoj sekegaj kaj dezertoj elbrulataj kaj glaciaj kampanoj, trans riveroj muĝantaj kaj maroj gargarantaj, tra landoj nigraj kaj arbaroj mallumaj de la homoj malamikaj kaj bestoj sovaĝaj.

La dieco malkaŝis al la Esperantistoj sekreton ĉarman kaj belegan. Kaj niaj kunuloj dankis per koro kaj per faroj. Nek ŝancelĝis nek cedis, nek malkuraĝis, nek plendis, nek malrapidis,—firmaj kaj fortaj kiel herooj kaj konfidplenaj kiel infanoj, malgraŭ malhonoro kaj malnobligo tamen ĉiutempe tre ĝojigitaj.

El la lipoj kaj koroj sonoris la kanto potenca de la espero granda, la kanto de la lingvo internacia, kiu ampleksis kaj ĉirkaŭprenis la tutan mondon, de la lingvo internacia, kiun jam postulis la grandaj filozofoj Bacon, Pascal, Leibniz kaj la granda lingva esploristo Jacob Grimm, kaj la granda filologo Max Mueller. Audu, mia koro! Unu nur lingvo en komerco kaj aliigo, kaj scienco kaj arto. Unu lingvo kaj unu sento kaj unu animo kaj unu koro!

Ĉu tio ne estas grandega espero?

Devas fali la bariloj, kiuj ĝis nun disigis kaj disŝiris la popolojn. Ĉesigu la envio, la ĵaluzo, la malkonsento, la malpaco, la malamo, la glavoj, la batalo sanga. Paco eniru, ora paco, luma paco, vera paco, popola paco, tutmonda paco, sensanga paco, eterna paco.

Ĉu tio ne estas grandega espero?

Kun la paco mano en mano la amo—korega kaj pura, kaj malfalsa kaj forta kaj firma kaj fidela amo de la homoj, amo, kiu plaĉas al reĝo de l'amo Jesuo la Nacareno, amo, kiu ĉion kredas, kaj ĉion esperas kaj ĉion suferas kaj ĉion ligas en felicxo ne komprenebla. Tie ĉi ne estas britoj, ne francoj, ne italianoj, ne svisoj, ne rusoj, ne germanoj, ne japonoj, ne ĥinoj, ne afrikanoj, ne amerikanoj. Tie ĉi ne estas riĉa, ne malriĉa, ne alta, ne malalta, ne saĝa, ne malsaĝa, ne viro, ne virino, ne junulo, ne maljunulo, ne sklavo, ne liberulo. Tie ĉi estas ĉiuj nur homoj, nenio pli alta, nenio pli malalta ol homoj, anoj de belega, sankta tuta io, de la homaro.

Ĉu tio ne estas grandega espero?

Fratoj kaj fratinoj, unu komprenas la alian, unu premas la manon de la alia, unu sentas kun la alia, unu apogas kaj subtenas la alian. La tuta mondo unu grandega frateco, eminenta unueco, viva familio. Ĉiuj, ĉiuj infanoj de nun patro!

Ĉu ne estas grandega espero, giganta espero?

Estu do ĉiuj ĝojaj, tre ĝojigitaj!

Verda estas nia stelo Verda signifas la koloron de la vivo, de la juneco kun okuloj, ardantaj kaj vangoj ardantaj, de "tiu juneco, kiu neniam al ni forflugas, de tiu kuraĝo, kiu pli frue aŭ malpli frue venkas la kontraŭstaron de la mondo.'

Digitized by Google

Verda estas la koloro de la juneco, kiu neniam maljuniĝas, de la eterna juneco: ĉar verda estas la simbolo de la espero, precipe de nia espero. Ĉar nia espero estas bela kaj freŝa kiel la printempo, sunplena kaj ĉielblua, parenca kun la espero, kiu predikadis la heroldo de la eterna feliĉego, Jesuo Kristo. Ĝi plantas la ĉielon sur la teron. Ĉu ni ne havas efektive rajton, esti tre ĝojigitaj?

Tial ni salutas vin, en la festotago, inter ĝardenoj florantaj, en la Elba teritorio. Ni salutas vin, o verda stelo, ni ĉiuj, tiel kiuj havas okulojn vidantajn, kiel la blinduloj, al kiuj vi estas la plej granda ĝojo, lumo klarega en la ĉielo malluma. Ni dediĉas al vi nian amon, nian laboron, nian fervoron nian vivon, senlace, al beno por nia tempo, por la estonteco, por la feliĉeco de niaj infanoj kaj nepoj

Ni salutas, o amata stelo, vian flagon. Ni kaptas kun nia pugno kaj etendas kaj ni blovigas vin gaje en la ventojn, plilarĝigas vin super la popolan maron. Neniu devas rabi ĝin. Ni daurigos ĝis la lasta spiro. Se la dekstra brako laĉigas,ni prenas ĝin per la maldekstra, se la maldekstra brako lace malleviĝas, ni la drapon plektas ĉirkau la bruston. Se ĝi estas tute disŝirigata, tamen ni ĝin estimas karege kaj sankte.

Ni salutas vin, o tre amata standardo. Mortante ankau ni kovras kaj ŝirmas vin per nia korpo. Esperantistoj ni estas ĝis la morto, fortaj kaj fidelaj kaj tre ĝojigitaj. Amen.

KUN DIO

Ankoraŭ alian fojon la senkompata kaj kruela Morto ekprenis de ni unu el niaj bonaj fratoj kaj amitaj samideanoj: Georges H. Diaz jam ne plu apartenas al ĉi tiu mondo. Antaŭ kelkaj tagoj li vizitis min ĉe mia oficejo por adiaŭi sin, deviginte forestadi nian ĉefurbon por efektivigi malongan provincan vojaĝeton. Hieraŭ mi sciiĝis, ke li mortis pro la holero kaj jam estis enterigita en tombejo de ia kvietema provinca vilaĝo, tre malproksime de lia amita Parizo.

Ni estis amikoj, kvankam iam okazis kontraŭajo bedaŭrinda, kiu min disigis iom da tempo de li, sed ne lin de mi, ĉar mi konsideradis, ke neniam ekzistis kaŭzo miaparte por ne kalkuli lin inter miaj plej estimindaj amikoj; li tute erare kredis min kolerigita.

Ian tagon mi diris lin: "Estu ni unu al la alia kiel antaŭe, Diaz, ĉar, ne forgesu, vi estas kaj ĉiam estos mia amiko, eĉ vi ne volas," kaj mi prezentis al li la manon, kiun li frate premis. Tiam post momenta silento ni ambaŭ ridetis.

Tiu ĉi manpremo estis paca sigelo, kiu fortigis la antaŭtiaman longedaŭradan amikecon.

Mi nun rememorigas ĉi tiun forgesindan malkomprenajon por esprimi kiel la pacigo farita kun ciame foririnta amiko superverŝas la koron per neesprimebla sento meze de nia ega malĝojo, kaj kiel multe plibone estas forgesi kaj pardoni ofendojn, ĉu verajn aŭ imagajn. Hodiaŭ ni estas fortaj, plenaj je la esperoj kaj iluzioj de la vireco; morgaŭ la plej malgrandega insekto superos nin.. .....

Mi ne scias ĉu mi devas pripensi mian karan mortan amikon kiel kompatinda aŭ feliĉa; sed mi scias, ke li estas tre bedaŭrita.

Ĉu tiu estas kompatinda, kiu eliras el malvirta mondo, kie la spirito tro ofte esta sklavo de la materio, por eniri alian kie nesanĝebla feliĉeco alportadas lin dolĉe tien kie regas la Kreinto?

Ĉu estas feliĉa tiu, kiu devis longe forlasi ĉiujn siajn amikojn, parencojn, siajn similulojn, kiujn li kore amegis?

Perdinte lin, la tuta Esperantistaro perdis fervoran ĝian kunbatalanton; la homaro unu, kiu ĝin amis; kaj mi, plore, amikon.

Mian plej koran kondolencon al la malfeliĉa patrino kaj estu al ĉi ioma konsolo scii, ke ĉia amata filo postviviĝadas ĉe la koroj de liaj neforgesemaj Filipinanaj Esperantistoj, kiel ĉe la ŝia.

EDGAR A. MCCLELLAN.

Aug., 1908.

BONA KONSILO

La sceno okazas en omnibuso ĉe Parizo. Du maljunaj sinjorinoj sidiĝas unu apud la alia. Unu deziras ke la pordokurteno estu fermita, la alia ĝin volas nefermita, oni vokas la kondukiston por decidi la aferon. 'Sinjoro, la unu diras, se tiu fenestro restas malfermita mi estas certa ke mi havos kataron kiu mortigos min. "Sinjoro, se oni fermas ĝin, diris la dua mi estas certa ke mi mortos pro apopleksia atako."

La kondukisto ne sciis kion fari, kiam maljuna sinjoro kiu ĝis tiam sidis trankvile, ĉe angulo de la veturilo, venis al lia helpo. "Fermu do, la pordakurtenon, mia kara amiko, tio mortigos unu, poste vi ĝin malfermos, tio liberigos nin de l'alia kaj ni havos pacon."

El franca lingvo tradukis de Fil. Esp. No. 20.

Digitized by Google

EKFROSTIĜANTA NAZO

(El Alexandre Dumas.)

La unuaj tagoj kiam Sto. Peterburgo sin vestis je blanka vestaĵo, estis por mi tagoj de kuriozaj vidaĵoj, car ĉio estis por mi novaĵo. Mi ne povis precipe lacigi min iradi glitveturile, ĉar estas ekstrema volupto sin senti fortirata sur kampo polurita kiel glacio per cevaloj al kiuj ekscitas la aera viveco kaj apenaŭ sentante ilian portaĵon ŝajnas flugadi prefere ol kuradi.

Tiuj unuaj tagoj estis por mi des pli agrablaj, ke la vintro aperiĝis iom post iom; tia maniere dank' al miaj feloj mi elportis ĝis 20 gradojn preskaŭ ne eksentinte ilin.

Ian tagon, ĉar la ĉielo estis tre hela kvankam la aero estis tiel akra kiel mi neniam estis ĝin sentinta, mi decidis fari miajn ekskursojn promenante. Mi min envolvis en astrakanfelta jako, mi plene surmetis felan ĉapon ĝis la oreloj, mi cirkaŭis mian kolon per kaŝmira kravato kaj mi riskis eliri sur la straton, nur havante, el mia tuta persono, la ekstremaĵon de l' nazo ĉe l' aero.

Unue, ĉio iris mirinde, mi eĉ miris je la malmulta impreso kiun la malvarmo al mi kauzis, kaj mallaŭte mi ridis je ĉiuj rakontoj al mi faritaj, cetere, mi estis ĉarmita havi tiun okazon alklimatigi min. Tamen, post iom da tempo mi kredis rimarki ke la personoj kiujn mi renkontis rigardadis min kun iom da maltrankvilo sed tamen nenion dirante al mi.

Baldaŭ, sinjoro, ŝajne pli babilema ol la ceteraj, diris al mi preterirante "Noss!" Ĉar mi neniam rusan vorton sciis, mi kredis ke pro unusilaba vorto ne estis ja inda ke mi haltigu miajn paŝojn, kaj mi daŭrigis mian iradon.

Je la angulo de la strato "Des Pois" mi renkontis veturigiston kiu preterpasis kuregigante lian glitveturilon sed kvankam lia kurado estis rapidega, li kredis devigata alparoli al mi siavice kaj min kriis "Noss! Noss!!".

Fine, alvenante ĉe la Admirala placo mi min trovis kontraŭ popolviro kiu nenion kriis al mi, sed kolektinte plenmanon da neĝo sin jetis sur min, kaj antaŭ ol mi estus provinta liberigi min tute, de mia vestaĵaro, eklavis mian vizaĝon, kaj ĉefe frotadis fortege mian nazon. Mi trovis la ŝercon sufiĉe malbonetan precipe en tiama vetero kaj elirante unu el miaj manoj el unu el miaj poŝoj mi donacis al li pugnobaton kiu ruligis lin dek paŝojn. Malfeliĉe au feliĉe por mi, du vilaĝanoj tiam estis pasantaj, kaj post momenta rigardo al mi, sin jetis sur min, kaj malgraŭ mia kontraŭbatalo kaptis miajn brakojn, dum tiu frenezulo al kiu mi jus donis tiel fortan baton, kolektis alian manplenon da neĝo kaj de nove sin jetis sur min. Tiun ĉi fojon profitante de mia neebleco min defendi, li rekomencis liajn frotadojn. sed se mi havis la brakojn kaptitajn mi havis la langon meligitan, kredante ke mi estis suferanto de ia eraro au de ia embusko mi demandis helpon per mia tuta forto.

Oficiro alkuris kaj demandis min france kio okazis al mi.

—Sed, sinjoro, mi ekkriis farante lastan klopodon por liberigi min de tiuj tri viroj kiuj je la plej trankvila maniero ekdaŭrigis ilian iradon. Ĉu vi do ne vidis tion, kion al mi faris tiuj sentaŭguloj?

—Kion do ili estas farintaj al vi?

—Sed ili frotadis mian nazon kun neĝo! Eble vi trovas tion, agrabla ŝerco pro la nuna vetero?

—Sed, sinjoro, ili igis al vi grandegan servon, respondis al mi mia parolanto.

—Kiel?

—Sen dube, vi ekhavis la nazon frostiĝatan.

—Jezuo! mi ekkriis portante la manon sur la minacita loko.

—Sinjoro, diris preteriranto sin adresante al la oficiro, mi avertas vin ke via nazo ekfrostiĝas.

Dankon, sinjoro, diris la oficiro, kiel se oni estus sciiginta lin plej simplan aferon, kaj malleviĝante li prenis amason da neĝo kaj igis al si mem la servon kiun faris al mi la kompatinda viro kies servemo mi tiel brute rekompencis.

—Tio signifas sinjoro ke sen tiu viro vi ne havus plu nazon, daŭrigis la oficiro frotante la sian.

—En tia okazo sinjoro, permesu min.

Kaj mi ekkuris post mia viro kiu kredante ke mi volis fini lin mortigi ekkuris sia vice, kaj ĉar la timo estas kompreneble pli facilmova ol la dankeco, mi kredeble estus neniam kaptinta lin, se kelkaj personoj vidante lin forkuri kaj ke mi lin persekutadis kredis ke li estis ŝtelisto kaj haltigis lin. Kiam mi alvenis mi trovis lin rapide parolanta por komprenigi ilin ke li nur estis kulpa pro troa filantropeco.

Dek rubloj kiujn mi donacis al li klarigis la aferon. La malfeliĉulo kisis al mi la manojn, kaj unu el la ĉeestantoj kiu parolis france invitis min pli atenti je mia nazo en la estonteco.

La invito estis neutila, ĝis la fino de mia ekskurso mi ne apartigis la okulojn de ĝi.

Tradukita el franca lingvo de Fil. Esp. N-o 20.

Digitized by Google

KOMPARO—Augusto 1900 kaj Augusto 1908

por F. ROCKMANN

elĉirpita el "Germana Esperanto-Gazeto"

Ekzistas momentoj ties okazintajoj sin fosas neforigeble en la homan memoron. Kiel tiaj mi nomas la Auguston de la jaro 1900 kaj la Auguston de 1908. Kaj tamen, kia granda diferenco inter ili ambau!

Augusto 1900! Mi sidas en la ĝardeno de l' "Elysée" palaco en Parizo kiel gasto de la aminda afabla prezidanto Loubet. Li aranĝis por siaj gastoj ĝardenfeston. Antau mi sidas la Saha mošto de Persujo. Apud mi dekstre ĉefkuracisto M. el Berlino, maldekstre kuracisto el Athen'o. En la plej granda proksimeco troviĝas rusoj, svedoj, angloj, italoj, k.t.p., oni alparolas ĉi tiun kaj tiun, sed plej ofte oni ricevas pli aŭ malpli bone la francan respondon: "Je ne comprends pas." Post la festteatrajo la gastoj kunvenas lau iliaj landoj en la promenadejoj de la ĝardeno. Eĉ ĉi tiuj, kiuj hejme opiniis povi paroli bone la francan lingvon, nun komprenis, ke ili ankoraŭ tre mallerte povis uzi la francan lingvon kun francoj kaj aliaj eksterlanduloj. La lingvodotitaj homoj tamen nun ne povis interkompreniĝi kun aliaj nacioj. Ilia lingvoscio ne sufiĉis.—Babel'o!—

Augusto 1908. En la "Kreuzkirche" (krucpreĝejo) en Dresdeno ĉirkaue 2000 personoj sidas el ĉiuj popoloj de l'mondo. La orgeno eksonas kaj unusone la majesta sankta kanto estas kantata en Esperanto: "Laudu ni Dion potencan reĝon l'tero."—Ili kune kantas: japonoj, rusoj, braziloj, angloj, meksikoj, serboj, francoj, danoj, k.t.p. Ili kantas: katolikoj, protestantoj, izraelidoj, k.t.p. Ili kune kantas: militistoj kaj nemilitistoj, riĉuloj kaj neriĉuloj, maljunuloj kaj junuloj. Ili kantis kvazau la infanoj de unu popolo, membroj de unu socio. Mi vidis kelkan barban viron, ties vizaĝo montris kortušon. Agrabla imposanta viro supreniras la predikan seĝon: pastro Kuhn. Li predikas al la multnacia popolo—en Esperanto. Lia entuziasmo, lia ideala spiritflugo ekkaptis ĉiujn auskultintojn. Morta silento estas en la preĝejo. Ĉiuj auskultas piege. Ĉiuj, tiel diversaj en lingvoj, moroj, kredoj, kaj elrigardo, komprenas lin.—Esperantujo!—

Tra la stratoj de l'urbo Meissen multkolora procesio marŝas. Maldekstre de mi paŝas profesoro Kroita de la universitato en Tokio, apud li la rajtigito de la japona registaro. Dekstre de mi la grandega svedo Formark marŝas en nacia festkostumo. Ni parolas kaj kompreniĝas bonege—en Esperanto. La festprocesio devas trapasi malvastejon. La najbaroj ŝanĝas. Ili estas jen francoj, jen angloj, jen rusoj, jen poloj, k.t.p. Sed la interparolado neniam ĉesas. Ni ĉiuj interkompreniĝas per Esperanto.—Esperantujo!

Babel'o—Esperantujo!

Ĉi tiun malon la tagoj de l'Augusto 1900 kaj de l'Augusto 1908 neforigeble prezentis al miaj sencoj.

Ankoraŭ mankas la tempo kaj trankvileco por raporti pri ĉiuj okazintajoj de la tagoj de la 15a ĝis la 23a de Augusto 1908, pri la tagoj de la kvara internacia kongreso en Dresdeno. Niaj amikoj do estu kontentaj, se ni hodiau nur raportis malmulton kaj la detalajojn pli poste rakontos. Sed la unu ni volas klarigi: La kvara internacia Esperanto-kongreso okazis bonege tute ne supozite. Ĝi montris al la esperantistoj kaj al la mondo: Ĉi tie estas la afero de l' grava kulturprogreso, kiun oni nun tute ne povas limigi. Ĉi tiu estas kulturposedajo ties zorgado meritas la ŝviton de la noblaj homoj—en la intereso de ĉiu nacio kaj en la intereso de l' internaciismo en komerco, interrilato kaj scienco.

MILITARY SURGEONS IN THE FIRST RANK OF ESPERANTISTOJ.—The military surgeons of the United States are forging ahead in their interest and work for the international language, which they believe will do an immense amount of good for the science of medicine as well as for commercialism and universal peace. At the First American Esperanto Congress, recently held at Chautauqua, N. Y., Major Walker, Surgeon, U. S. A., was one of the leaders, and little Miss Winifred Sackville Stoner, Jr., daughter of Lieutenant-Colonel J. B. Stoner, Surgeon P.H. & M.H.S., was the youngest Esperantist holding a diploma from the International Esperanto Institute for being able to read, write and converse in the wonderful tongue. Little Miss Stoner is but five years of age, but having heard her father and mother talking Esperanto for the past year she could not help imbibing it. Dr. Stoner is now busy trying to bring his brother officers into the fold of "universal peacedom," and hopes to organize The P.H. & M.H.S. Esperanto Association."—*The Military Surgeon*, Sept., '08.

Digitized by Google

AT ONE PLACE

IN MANILA YOU CAN GET SHIRTS AND UNDERWEAR MADE TO ORDER BY EXPERIENCED CUTTERS WHO ARE EXCLUSIVELY DEVOTED TO THIS LINE; ALL ARTICLES WILL BEAR THIS MARK

MANILA SHIRT FACTORY
MANILA

WHICH IS A GUARANTEE OF FIT, WORKMANSHIP, QUALITY AND COMFORT

127 ESCOLTA

Moderate prices

HOTELS

HOTEL DE FRANCE

ESCOLTA

CENTRAL POSITION,
GOOD TABLE AND ALL
MODERN CONVENIENCES

Correspondence in English, Spanish, French and Esperanto.

LA GRANJA

Trinidad, Benguet

THE HEALTH RESORT OF THE PHILIPPINES

PRICES MODERATE

Bask in the bracing breezes of the pine-covered hills of Benguet.

SANITAS FOOD AND SUPPLIES

633-637 CALZADA DE BILIBID, MANILA (NEXT THE PRISON ENTRANCE) : : : : : : : : P. O. BOX 175

SELLS

THE SANITARIUM HEALTH FOODS, (LOS ALIMENTOS "SANITAS"). pure cereal and nut foods of unapproached quality.

THE SANITAS MASSAGE ROLLERS, in eight sizes and styles,—the best thing for self-manipulations. Are employed to effect natural increase in weight, or the reduction of size of particular parts.

THE SANITAS CHAIR, a new chair, containing more points of adaptation to Philippine use than any other. It is best for study or sewing, steamer or siesta. Write for further description and price.

THE CAJA-CALORICA, TRADE MARK the modern "fireless" cook-stove. It employs for cooking purposes the well-known *insulating* principles which have made the refrigerator a success and a household necessity, and the refrigerator is not more indispensable in Philippine living. The CAJA-CALORICA enables the housewife to do more of her own cooking, and with greatest economy of time, fuel, and convenience. The CAJA-CALORICA is a boon to persons living alone in the Philippines as with it they can readily be their own cooks. Further particulars furnished on request.

THE AUTOCALESA, TRADE MARK the motor-carriage made in America for Philippine roads,—not only for the streets of Manila but for the highways and byways of the provinces. Travels and "stands up" in the provinces because it is built that way, being high (high carriage wheels), and strong, and durable. Because of little first cost and economical upkeep (*solid* tires and simple mechanism) it is *the* machine for the Philippines. The AUTOCALESA is an easy-riding carriage with motor attachment; easy to ride in; easy to control; easy to maintain and easy to buy. It is made by the pioneers of the motor-*carriage* industry in the United States and has six years of solid success to recommend your further investigation of its merits for the Philippines. Send for the AUTOCALESA circular.

Digitized by Google

Addresses of Esperanto Gazettes

and their subscription price per annum in International Money Unit—Sm. 1.000-₱1.026

* Monthly. ** Fortnightly. † Entirely in Esperanto. || Esperanto and National

"ESPERANTO" ** † Sm. 1.20
8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"ESPERO KATOLIKA" * † Sm. 2.00
Pastro Em. Peltier,
Ste-Radegonde, Tours, I.-et-L., France.

"ESPERANTA LIGILO" * † Sm. 1.20
(en reliefpunktoj por blinduloj)
12, rue Soufflot, Paris (V) France.

Sm. 2.80
"ESPERANTA INTERNACIA REVUO" * †
Ulloi-út 59, Budapest, Hungary.

"ESPERO PACIFISTA" * † Sm. 2.00
26, rue de Chartres,
Neuilly-sur-Seine, France.

"EUROPA KRISTANA CELADO" * † Sm. 0.75
S-ro Ch. Briquet, rue de la Cité,
Geneva, Switzerland.

"FLUGILA STELO" * † Sm. 1.04
P-ro Schneeberger,
Lusslingen, Switzerland.

"FOTO REVUO" * † Sm. 2.00
118, Rue d'Assas, Paris, France.

"INTERNACIA SCIENCA REVUO" * † Sm. 2.80
8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"INTERNACIA SOCIA REVUO" * * † Sm. 2.40
S-ro R. Louis,
45, rue de Saintonge, Paris (III) France.

"JUNA ESPERANTISTO" * † Sm. 1.00
33, rue Lacepede, Paris, France.

"LA REVUO" * † Sm. 2.80
76, Boulevard St-Germain, Paris, France.

"LA UNUIGO DE L'BIBLIOFILOJ" * * † Sm. 1.00
S-ro E. Philippe, Auby-Nord, France.

"LIBERA PENSO" * † Sm. 1.60
S-ro R. Deshays, Sens, France.

"LINGVO INTERNACIA" * † Sm. 3.00
33, rue Lacepede, Paris, France.

Sm. 2.00
"OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA" * †
51, Rue de Clichy, Paris, France.

"TRA LA FILATELIO" * † Sm. 0.80
S-ro J. Fize, Beziers, France

"TRA LA MONDO" * † Sm. 3.20
15, boulevard des Deux-Gares,
Meudon, S.-et-O., France.

"VOCHO DE KURACISTOJ" * † Sm. 1.00
D-ro Stefan Mikolajski,
Sniadekich, 6, Lwow, Austro-Galicia.

"LA SPRITULO" * † Sm. 1.20
S-roj Bereiter & Meissner,
Johannisstrateto 30, Leipzig, Germany.

"AFRIKA ESPERANTISTO" * ||
5, rue du Marché, Algiers, Algeria.

Sm. 1.50
"THE AUSTRALIAN ESPERANTIST" * ||
S-ro R. Dossor, Bridge str., Benalla,
Victoria, Australia.

"LA BELGA SONORILO" ** || Sm. 2.40
S-ro J. Coox, Duffel, Belgium.

Sm. 1.50
"ČASOPIS ČESKYCH ESPERANTISTO" * ||
Praha, Bohemia, Austria.

"LUMO" * || Sm. 2.00
V. Tirnovo, Bulgaria.

Sm. 2.40
"BRAZILA REVUO ESPERANTISTO" * †
S-roj M. Piedade & Co.,
Ruo da Asamblea, Rio-de-Janeiro.

"ČILO ESPERANTISTA" * || Sm. 1.00
Casilla 1989, Santiago, Chile.

"LA DU STELOJ" * || Sm. 2.00
Casilla 728, Santiago de Chile.

"DANA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.10
Gyldenlovesgade 16,
Copenhagen, K, Denmark.

"FILIPINA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
P. O. Box, 326, Manila.

"L'ESPERANTISTE" * || Sm. 1.40
Louviers, Eure, France.

"PARIS-ESPERANTO" * || Sm. 0.60
S-ro V. Chaussegros,
3, Place Jussieu, Paris, France.

"L'ETOILE ESPERANTISTE" * || Sm. 1.60
3, rue Sophie-Germain, Paris, France.

"SARTA STELO" * || Sm. 0.40
rue Scarron, 14, Le Mans, France.

"LE PHARE Sm. 1.60
STENOGRAPHIQUE ET ESPERANTISTE" * ||
60, Rue des Carmes,
Rouen, France.

Digitized by Google

"GERMANA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.5
95, Prinzenstrasse, Berlin, Germany.

Sm. 2.00
"GERMANA ESPERANTO-GAZETO" * ||
S-ro H. Wuttke, Pionierstrasse, 21,
Magdeburg, Germany.

"EHO ESPERANTISTA" * ||
G. m.b.h., Dessauerstr., 1, Berlin, Germany

"LA BELA MONDO" *
Bismarkplatz 12 Dresden, Germany.

"THE BRITISH ESPERANTIST" * || Sm. 1.50
133-136, High Holborn, London, W.C.

"LA ESPERANTA INSTRUISTO" * || Sm. 1.00
17 St. Stephen's Sq., Bayswater, London.

"LA VAGABONDO" * ||
16 Westbourne Gardens
Hove, Sussex, England.

"FINNA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.20
Helsingfors, Finland.

"LA PIONIRO" * || Sm. 2.00
Hon. Sec. de la Kolar Gold Field,
Marikuppan, Mysore State, South India.

"STELO DE L'ORIENTO" * ||
Pretoria St., Calcutta.

"LA SUNO HISPANA" * || Sm. 1.20
S-ro A. Jimenez Loira,
Avellanas, 11, Valencia, Spain.

"STELO KATALUNA" * ||
Rambla S. Isidro 30,
Igualado, Barcelona, Spain.

"TUTMONDA ESPERO" * || Sm 1.60
Paradis, 12, pral., Barcelona, Spain.

"AMSTERDAMA PIONIRO" * || Sm. 1.25
Singel, 386, Amsterdam, Holland.

"LA VERDA STANDARDO" * || Sm. 1.66
Ulloi-út 59. IV, 8, Budapest.

"ROMA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.20
198, Babuino, Rome, Italy.

"JAPANA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.60
3, Čome, Jurakčo,
Kojimačik, Tokio, Japan.

"MEKSIKA REVUO" * || Sm. 1.00
Cocheras, num. 2, Mexico, D. F.

"VERDA STELO" * || Sm. 1.00
D-ro A. Vargas,
3a del Reloj, numero 12, Mexico, D. F.

"ESPERANTA GAZETO" * || Sm. 0.75
Calle Morelos, 995, Guadalajara, Mexico.

"ANTAUEN ESPERANTISTOJ" * || Sm. 1.20
Apartado 927, Lima, Peru.

"POLA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
Hoza No. 40, m. 8, Varsovio, Poland.

Sm. 1.20
"RUMENA GAZETO ESPERANTISTA" * ||
Soc. Esperantista, Galatzo, Roumenia.

"RUMENA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
5, Str. I. C. Bratianu, Bukarest, Roumenia.

"ESPERO" * || (Vjestnik Znania,) Sm. 4.00
Nevskij pr., d. No. 147,
St. Peterburg, Russia.

"ESTLANDA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.60
Weike Kalamaja uul. 7, k. 2, Revel, Russia.

"ESPERANTISTEN" * || Sm. 1.40
37, Surbrunnsgatan, Stockholm, Sweden.

"SVISA ESPERO" * || Sm. 1.00
6, rue du Vieux College, Geneve, Svisa.

"AMERIKA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
186, Fortieth street, Chicago, U. S.

"THE ESPERANTO NEWS" * * || Sm. 2.00
10, Wall St., Room 510, New York City.

THE ESPERANTO STUDENT" * || Sm. 1.00
22 Meadow Road, Rutherford, New York.

MEMBERS WHO HAVE JOINED THE P.E.A. SINCE LAST ISSUE

654 MR. FELIPE TEMPONGKO, 284 Bilibid (Old), Quiapo.
655 MR. ARTURO BERNIA, Florida Blanca, Pampanga.
656 MR. E. MENDIOLA, 274 Enrile, Manila.
657 MISS MANUELA E. REYES, 11 Quiotan, Santa Cruz, Manila.
658 MR. JUAN V. MONTES, 51 San Pedro, Santa Cruz, Manila.
659 MR. LUTHER PARKER, Bacolor, Pampanga.
660 MR. CRISTOBAL GARCIA, Compañía General de Tabacos, Cebú.
661 MR. G. P. MOBLEY, Wireless Station, Zamboanga.
662 MR. MURRAY L. HOWARD, Wireless Station, Zamboanga.
663 MR. FRANCISCO CAROL, Compañía General de Tabacos de Filipinas, Manila.
664 MR. MARCIAL PEREZ, M. R. R. & E. L. Co., San Marcelino, Manila.
665 MISS CONSTANCIA POBLETE Y ARRIETA, Redacción de La Democracia, Manila.
666 MR. QUIMET LLANSO Y JORNET, Compañía General de Tabacos de Filipinas, Manila.
667 MR. VICENTE BARRENA, 562 Bilibid, Manila.
668 D&. JOSÉ LUGAY, M.D., Guiwan, Samar.
669 MR. CARLOS A. SANCHEZ, % E. C. McCullough & Co., Manila.
670 MR. MANUEL WAGO, Puerta del Sol, Manila.
671 MR. S. M. BERGER, 525 Calle Paz, Manila.
672 MR. ALFONSO ESPIRITU, Mariquina, Rizal, P. I.
673 MR. W. W. WESTON, Box 221, Manila.
674 MR. ERNEST I. FORRER, c.o. Sprungli & Co., Manila.
675 MR. ANGEL CASTRO, Azcarraga No. 248, Tondo.
676 MR. YE CHE HIN, P. O. Box 47 Manila.

Digitized by Google